

# DIA REGNO DIA REGNO

• dumonata kristana revuo en esperanto • (820) I, januaro – februaro 2000

DIA REGNO  
ISSN 0167-9554

## KELI-KONGRESO 2000



JANSKÉ LÁZNĚ  
ČEĀA RESPUBLIKO

## AL LA EFEZANOJ

## KELI

Kristana Esperantista Ligo Internacia  
fondita en 1911, neneŭtrala, kunlaboranta  
kun UEA

*Celo: Krei efikan kontakton inter kristanoj el  
diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la  
Evangelion pri Jesuo Kristo.*

**Prezidanto:** Adolf BURKHARDT, ☒ Gimpelweg 1  
DE 73235 Weilheim an der Teck, Germanio;  
☎: +49 7023 72413

**Sekretario:** Els VAN DIJK-KUPERUS  
☒ Koningsmantel 4, NL 2403 HZ Alphen a/d Rijn,  
Nederlando; ☎: +31 1724 20222;  
✉: javadi@worldonline.nl

**Kasisto (kaj matrikulisto):** Siegfried KRÜGER,  
☒ Dinkelsbühler Str. 12, DE 74074 Heilbronn,  
Germanio; ☎: +49 7131 162688; ✉: keli.@gmx.de

**Kotizoj:** Rekta membro kun gazeto,  
minimуме Euro 13,00.

☉ Membro-subtenanto Euro 19,50 ☉ Nura abono:  
pagante rekte al KELI Euro 11,00; pagante al  
Libroservo Euro 13,00. Mensejoj de okcidentaj  
monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI  
☉ Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto  
(informiĝu ĉe UEA) bonvolu preferi pagi al UEA  
por konto KELK-P de KELI ☉ Nederlanda  
poŝtĝirkonto de KELI: 5506132.

## DIA REGNO

Oficiala organo de KELI, fondita en 1908  
Monata revuo – ISSN 0167-9554

**Redaktoro:** Philippe COUSSON,  
☒ 26 rue de Pré-Ventenet, FR 86340, Nouaillé-  
Maupeutuis, Francio; ☎: +33 (0)5 49 46 80 21;  
✉: diaregno@altern.com.

**Manuskriptojn oni sendu nur al la Redaktoro!**  
**Abonprezo** sen membreco en KELI: Euro 11,- aŭ  
egalvalor. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la  
kaso de KELI (vidu supre).

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la  
aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe, ke  
oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ  
traduko oni sendu al la Redaktoro.*

**Kompostado, grafika prilaboro, presado  
kaj ekspedado:**

Eldonejo „HEJME” Kazimierz LEJA,  
☒ pf. 59, PL 41-250 CZELADŹ, Pollando  
☎: +48 32 265 05 91; ✉: kleja@post.pl.

## ENHAVTABELO

- p. 3 AL LA EFEZANOJ  
nova traduko de Gerrit BERVELING
- p. 8 ESPERANTO EN 1999  
Trakuro tra la jaro,  
de Aleksander KORĴENKOV
- p. 11 NOVJARA MESAĜO DE LA  
PREZIDANTO DE UEA  
Kep ENDERBY
- p. 14 POR DONI AL VI  
ESTONTECON KAJ ESPERON  
novjara mesaĝo de la prezidanto de KELI,  
Adolf BURKHARDT
- p. 16 TEMPO, TEMPOJ  
La tempo, la homoj, Dio  
de Philippe COUSSON
- p. 24 ALVOKIĜO  
Ermita saĝo, de Jacques TUINDER  
kaj krome diversaj recenzoj, informoj  
kaj via kruccvortenigmo.

## REDAKTORAJ VORTOJ

Jen nun, ĝi troviĝas antaŭ vi, tiu nova vesto de  
via revuo *Dia Regno*.

Legu ĝin, frandu ĝin, kaj ankaŭ ne hezitu (plu)  
prezenti ĝin ĉirkaŭ vi.

Vi povas daŭre konstati ke mi uzis elementojn,  
kiuj venis el la interreto, feliĉe (Dankon al la di-  
versaj listoj!). Mi atendas, same daŭre, viajn di-  
versajn kontribuojn. Tiel tiu revuo pli fariĝos via,  
kaj pli fariĝos interesa.

Nia epoko estas por homo kiu pripensas sian  
mondon, demandoveka. Pluraj problemoj, etikaj,  
politikaj, sociaj, sciencaj kaj religiaj (re)aperas. Ni  
ĉiuj bezonas havi pli da vidpunktoj por eliri el nia  
propra rutino. Eĉ mallonga notico estas interesa,  
certe.

Espereble, jam en la venonta numero troviĝos  
kolekto de reagoj al tiu „nova” *Dia Regno*.

Se vi pensas, ke devus troviĝi rubriko en la re-  
vuo, kiu ne troviĝas nun, ne hezitu skribi pri tio.  
Kaj ankaŭ, kial ne, kontribui unua al ĝi.

Per tiuj vortoj, mi volas ankaŭ transdoni al ĉiuj  
miajn plej korajn bondezirojn por la nova jaro, kaj  
petas sur vin la Dian benon, laŭ Lia promeso.

Philippe COUSSON

## aŭtoro, adresitoj, saluto

1:1 Paŭlo, pro volo de Dio apostolo de  
Jesuo Mesio, al la sanktuloj <en Efezo><sup>1</sup>  
kaj al la fiduloj en Mesio Jesuo: 2 gracon al  
vi kaj pacon de Dio nia Patro kaj de la Sin-  
joro Jesuo Mesio.

## laŭdokanto

3 Benata estas la Dio kaj Patro de nia Sin-  
joro Jesuo Mesio: en la ĉielaj regionoj Li  
benis nin en Mesio per ĉia spirita beno.  
4 Ĉar en li Li elektis nin, jam antaŭ la fondo  
de la mondo, por ke ni staru antaŭ Li, sankt-  
aj kaj senmakulaj en amo. 5 Li destinis nin  
esti Liaj infanoj per Jesuo Mesio, laŭ Lia  
volo, 6 laŭde al la gloro de Lia graco, per  
kiu Li pridonacis nin en la Amata. 7 En li ni  
estas savitaj per lia sango, kaj pardonigis  
niaj pekoj, dank’ al lia riĉa graco. 8 Per tio li  
superŝutis nin en sia tuta saĝeco kaj scio.  
9 La misteron de Sia volo Li konigis al ni,  
konforme al la decido kiun Li prenis en Me-  
sio: 10 Li realigos la plenecon de la tempoj,  
kunigos ĉion en Mesio sub unu kapo, ĉion  
en la ĉielaj regionoj kaj ĉion surtere. 11 En  
li ni ankaŭ ricevis nian heredaĵon, destinite  
al tio per la decido de Tiu, kiu per Sia volo  
ĉion estigas. 12 Ni, kiuj jam antaŭe metis  
nian esperon sur Mesio, servu je laŭdo de  
lia gloro. 13 En li ankaŭ vi aŭdis la parolon  
de l’ vero, la bonan mesaĝon de via saviĝo;  
en li ankaŭ vi venis al la fido; vi estis sigeli-  
taj per la promesita sankta Spirito, 14 la an-  
taŭpago de nia heredaĵo, por liberigo de la  
popolo kiun Li akiris al si, laŭde al Lia glo-  
ro dankodiro kaj preĝo. 15 Mi aŭdis pri via  
fido en la Sinjoro Jesuo kaj pri via amo por  
ĉiuj sanktuloj. Tial 16 senĉese mi dankodir-  
as kaj mi primemoras vin daŭre en miaj  
preĝoj. 17 La Dio de nia Sinjoro Jesuo Me-

sio, la Patro de l’ gloro, donu al vi spiriton  
de saĝeco kaj revelacio, por koni Lin vere.  
18 Li lumigu la okulojn de via koro tiel ke  
vi vidu kiel granda estas la espero, al kiu Li  
vokas vin, kiel riĉa la gloro de lia heredaĵo  
meze de l’ sanktuloj<sup>2</sup>, 19 kaj kiel abunda lia  
potenco super ni, fiduloj. La samajn poten-  
con kaj forton 20 Li montris en Mesio, kiam  
Li levis lin el la mortintoj kaj sidigis lin ĉe  
sia dekstra flanko<sup>3</sup> en la ĉielaj regionoj, 21  
alte super ĉiuj potencoj, povoj, fortoj kaj  
moŝtoj, kaj super ĉiu nomo menciata, ne nur  
en ĉi tiu sed same en la venonta mondo. 22  
Ĉion Li metis al li sub la piedojn<sup>4</sup>, kaj lin  
mem — altigitan super ĉio — li donis kiel  
kapon al la eklezio, 23 kiu estas lia korpo, la  
pleneco de tiu kiu plenigas ĉion ankaŭ la  
goyo repacigitaj kun Dio.

2:1 Ankaŭ vin, kiuj estis mortaj per viaj  
eraradoj kaj pekoj, 2 en kiuj siatempe vi vi-  
vis laŭ la ĉi-tera mondo, kiam vi ankoraŭ  
lasis vin gvidi de la reganto de l’ regiono de  
la aero, la spirito kiu ankoraŭ laboradas in-  
ter la neobeemaj...<sup>5</sup> 3 Ankaŭ ni ĉiuj siatem-  
pe apartenis al ili, dum nian vivon ni lasis  
regi de pekaj deziroj, farante kion sugestis  
al ni niaj pekaj pensoj. Denature ni estis ob-  
jekto de l’ Dia kolero, same kiel la ceteraj.  
4 Sed per sia granda amo Dio, riĉa je kom-  
patemo, 5 en Mesio vivigis nin, kiuj estis  
mortaj per niaj transpaŝoj. Al lia graco vi

<sup>1</sup> La indiko de l’ adresitoj ne estas klara. En kelkaj  
manuskriptoj simple mankas kiu ajn indiko; kelkaj  
aliaj legas Laodiceo. Plej verŝajne la letero origine  
ne estis destinita por unu difinita loka eklezio.

<sup>2</sup> Rdm 33:3 k.s.

<sup>3</sup> Psa 110:1.

<sup>4</sup> Psa 8:7 (6).

<sup>5</sup> La frazo ne estas kompleta; ĝin Paŭlo ne  
finis aŭ ĝi estis difektita.

ŝuldas vian saviĝon. 6 Li relevis nin kune kun li kaj sidigis nin en la ĉielaj regionoj, en Mesio Jesuo, 7 por montri la abundan riĉon de lia graco en la estontaj eonoj, per lia boneco al ni en Mesio Jesuo. 8 Ĉar al tiu graco vi ŝuldas vian saviĝon per la fido; kaj tion vi ne ŝuldas al vi mem. Estas donaco de Dio. 9 <Vi> ne <ŝuldas ĝin> al viaj faroj, por ke neniu estu fiera. 10 Faraĵo de Dio ni ja estas, kreitaj en Mesio Jesuo, por fari <en nia vivo> la bonajn agojn, kiujn Dio preparis por ni, por ke per tio ni vivu. 11 Do konsciu, ke vi — ĉi-tere la gojoj, t.n. necirkumciditoj nomataj laŭ tiuj, kiuj pro korpa faro sin nomas cirkumciditoj — 12 <konsciu do>, ke siatempe vi estis disigitaj de Mesio, ekskluditaj de Izraela civitaneco kaj fremdaj al la promesoj de l' interligo, sen espero, sen Dio en la mondo. 13 Sed nun, en Mesio Jesuo, vi kiuj estis malproksimaj proksimiĝis<sup>6</sup>, per la sango de Mesio. 14 Ĉar li estas nia paco<sup>7</sup>, li kiu unuigis la du <mondojn>, kiu mal-konstruis la baron, neniigante en sia propra karno la malamikecon, 15 la Toraon kun ĝiaj ordonoj kaj devigoj. Li faris pacon, kreante en sia persono el tiuj du unu novan homon, 16 kaj repacigante ambaŭ unukorpe kun Dio per la kruco, sur kiu la malamikecon li mortigis. 17 Li venis kaj mesaĝis pacon: al vi, la malproksimaj, kaj <al ni>, la proksimaj<sup>8</sup>. 18 Ĉar per li en unu Spirito ni ambaŭ havas aliron al la Patro. 19 Tiel do vi ne plu estas fremduloj kaj senhejmuloj, sed kuncivitanoj de l' sanktuloj, samdomanoj de Dio, 20 konstruitaj sur la fundamento de apostoloj kaj profetoj, dum la angulŝtono<sup>9</sup> estas Mesio Jesuo. 21 Sur li kiu kuntenas la

<sup>6</sup> Jsa 57:19.

<sup>7</sup> Miĥ 5:4 (5); Jsa 9:5.

<sup>8</sup> Jsa 57:19.

<sup>9</sup> Jsa 28:16.

<sup>10</sup> La frazo ne estas kompleta; ĝin Paŭlo efektive ekprenas denove en versiklo 14.

<sup>11</sup> Laŭlitere: diakono.

<sup>12</sup> La frazo ne estas tute klara; ĉu aliro al Dio?

<sup>13</sup> Ijb 11:7-9.

tutan konstruaĵon, ĝi elkreskas en templon sanktan en la Sinjoro. 22 Sur li ankaŭ vi estas plukonstruata en la Spirito en domon de Dio.

### la servo de Paŭlo inter la gojoj

**3:1** Tial do mi, Paŭlo, la kaptito de Mesio Jesuo, pro vi, la gojoj...<sup>10</sup> 2 Vi ja aŭdis pri la graco kiun Dio pro vi atribuis al mi; 3 al mi, kiel mallonge mi jam skribis al vi, ja estis revelaciita la scio de l' mistero. 4 Tial do, kiam tion ĉi vi legas, vi povas imagi mian komprenon pri la mistero de Mesio. 5 Neniām en antaŭaj generacioj estis revelacite al homidoj, kiel nun estis evelacite en la Spirito al liaj sanktaj apostoloj kaj profetoj: 6 ke la gojoj estas kunheredantoj, membroj de la sama korpo kaj kunuloj de l' promeso en Mesio Jesuo pere de l' bona mesaĝo, 7 kies servanto<sup>11</sup> mi estas dank' al la dono de l' Dia graco, donacita al mi pere de lia potenco. 8 Al mi, la plej eta inter ĉiuj sanktuloj, estis donita tiu ĉi graco: ke mi povas mesaĝi al la gojoj la nepenetreblan riĉon de Mesio, 9 kaj ke mi metas en lumon, kiel realiĝas la mistero, kiu depost eterneco estis kaŝita en Dio, Kreanto de ĉio, 10 por ke al la regantoj kaj potencoj en la ĉielaj regionoj nun estu konigita pere de l' eklezio la plej bunta saĝeco de Dio. 11 Tio do estis lia de-eterna decido, kiun Li plenumis en Mesio Jesuo, nia Sinjoro. 12 Per li, dank' al la fido je li, ni havas plenkofidan aliron<sup>12</sup>. 13 Mi do petegas vin ne perdi la kuraĝon ĉe la prematecoj, kiujn pro vi mi suferas: ili ja estas honoro. 14 Tial do miajn genuojn mi fleksas antaŭ la Patro, 15 laŭ kiu nomiĝas ĉiu patreco en la ĉieloj kaj surtere: 16 en la riĉo de sia gloro Li donu al vi, ke interne vi estu fortigita de lia Spirito, 17 tiel ke per la fido Mesio loĝu en via koro, kaj vi enradikiĝu kaj estu fundamentitaj en la amo. 18 Kaj kune kun ĉiuj sanktuloj vi lernu kompreni, kio estas la longeco kaj la larĝo, la alteco kaj la profundo<sup>13</sup>, 19 kaj ke vi ekkonu la amon de Mesio, kiu superas ĉiun scion; ke vi pleniĝu de l' Dia pleneco. 20 Al Li, kiu povas plenumi senfine pli ol ni eĉ povas peti

aŭ elpensi per la forto aganta en ni<sup>14</sup>: 21 al Li estu la gloro en la eklezio kaj en Mesio Jesuo, ĉiun generacion denove, de eterne al eterne! Amen.

### unueco en diverseco

4:1 Mi, kaptito en la Sinjoro, mi do petas vin, ke vi vivu laŭ la vokiĝo, kiun vi ricevis <de Dio>, 2 ke vi ĉiam estu humilaj, mildaj, paciencaj, kaj ameme vi toleru unu la alian, 3 plenaj je diligento por konservi la unuecon de l' Spirito per la ligo de la paco: 4 unu korpo kaj unu Spirito, same kiel vi estis vokitaj en unu espero de vokiĝo. 5 Unu Sinjoro, unu fido, unu bapto. 6 Unu Dio kaj Patro de ĉiuj, kiu estas super ĉiuj, kun ĉiuj, en ĉiuj. 7 Sed ĉiu el ni unuope ricevis la gracon laŭ la mezuro de l' donaco de Mesio. 8 Tial legiĝas: Leviĝante al la altoj, li kaptis kaptitojn kaj disdonis donacojn al la homoj<sup>15</sup>. 9 Tiu Leviĝante, kion alian ĝi signifu ol ke unue li descendis ĝis surtere? 10 Li kiu descendis, estas la sama kiu leviĝis, alte super la ĉieloj, por plenumi ĉion. 10 Li ankaŭ disdonis donacojn. Kelkajn li faris apostoloj, aliajn profetoj, aliajn evangelistoj, ree aliajn paŝtistoj kaj instruistoj, 12 por ekipi la sanktulojn al la laboro de l' servado, al la konstruado de la korpo de Mesio, 13 ĝis ni ĉiuj atingos la unuecon en la fido kaj la scion de l' filo de Dio, ĝis <ni atingos la staton de> perfektulo, la adoltan plenecon de Mesio. 14 Tiam ni ne plu estos neadoltaj, skuitaj kaj tirataj de ĉiu ekblovo — tia instruado, kiu per falsa ludo de ruzuloj misgvidas al erarado. 15 Ne, ni parolu la veron en amo, kaj ni kresku plene al Mesio. Li estas la kapo. 16 Kaj la tutan korpon li firme interligas kaj kuntenas en ĉiuj ĝiaj artikoj. Ĉiu agas per la forto kiu taŭgas por ĝi. Tiel kreskas la korpo kaj konstruiĝas en amo.

### la malnova kaj la nova homo

17 Mi diras al vi, kaj mi ĝin priatestas en la Sinjoro: ne plu vivu kiel vivas la gojoj en la vaneco de siaj pensoj! 18 Ilia intelekto

estas ombrita, ili fremdiĝis de l' Dia vivo per la senscio kiu regas inter ili kaj per sia ŝtoniĝinta koro. 19 Morale brutigite, ili sin transdonis al senbrideco por avide profiti el ĉiaj malmoralaj praktikoj. 20 Sed ne tiel vi ekkonis Mesion! 21 Ĉar vi aŭdis pri li kaj instruiĝis en li, kiel la vero estas en Jesuo. 22 La malnovan homon vi devas demeti — tiun de via antaŭa vivado, kiu pereas per siaj trompaj deziroj, 23 — kaj vi novigu vin spirite kaj intelekte. 24 Vestu vin per la nova homo, kiu estis kreita laŭ <la bildo de> Dio en vera justo kaj sankteco<sup>16</sup>. 25 Tial, for kun la mensogo! Ĉiu parolu al sia proksimulo la veron<sup>17</sup>, ĉar ni estas membroj unu de la aliaj. 26 Se vi ekkoleras, ne peku<sup>18</sup>. La suno ne subiru super via kolero; 27 ne donu ŝancojn al la diablo. 28 Kiu estis ŝtelisto, ne plu ŝtelu; prefere li klopodu por propramane perlabori sian vivtenon, tiel ke al senhavuloj li povos ion doni. 29 Neniu malbona vorto pasu viajn lipojn, sed nur bonaj vortoj, edifaĵ, se necesas, bene por la aŭkultantoj. 30 Ne ĉagrenu la sanktan Spiriton de Dio<sup>19</sup>; vi estis sigelitaj de Li por la tago de l' saviĝo. 31 Ĉiu vengemo, koleriĝemo, indigno, sakrado kaj kalumniado de vi malaperu, kune kun ĉio malbona! 32 Estu bonaj kaj kompatemaj unu al la alia. Pardonu unu la alian, kiel ankaŭ Dio pardonis vin en Mesio. **5:1** Imitu do Dion, kiel liaj amataj infanoj, 2 kaj amu unu la alian, ĉar ankaŭ Mesio amis nin kaj transdonis sin pro ni kiel donaĵon kaj oferon al Dio en agrablaodoro<sup>20</sup>.

### infanoj de la lumo

3 Malĉasto kaj malmoraleco de kiu ajn formo, aŭ avido inter vi eĉ ne estu men-

<sup>14</sup> Alia traduko: Al Li, kiu per la forto aganta en ni povas plenumi senfine pli ol ni eĉ povas peti aŭ elpensi.

<sup>15</sup> Psa 68:19 (18).

<sup>16</sup> Gen 1:26; Saĝ 9:3.

<sup>17</sup> Zef 8:16.

<sup>18</sup> Psa 4:5 (4).

<sup>19</sup> Jsa 63:10.

<sup>20</sup> Gen 29:18; Psa 40:7 (6).

ciita. Tiel decas al sanktuloj. 4 Ankaŭ ne estu inter vi hontinda, malsaĝa aŭ frivola lingvaĵo, ĉar tio ne decas, sed prefere dankodiroj. 5 Bone konsciu: malĉastulo, malpurulo aŭ avidulo — kio identas je idoladoranto — ne havas heredaĵon en la regno de Mesio kaj de Dio. 6 Neniu per vantaj vortoj mistifiku vin: pro tiaj aferoj la kolero de Dio trafas la neobeemajn. 7 Kun ili vi ne rilatu. 8 Ĉar iam vi estis obskuro, sed nun lumo vi estas en la Sinjoro. Vivu do kiel infanoj de la lumo. 9 Frukto de la lumo nur povas esti bono, justeco, vero. 10 Provu malkovri, kio plaĉas al la Sinjoro. 11 Ne partoprenu en la senfruktaj agoj de l' obskuro, prefere refutu ilin. 12 Ĉar kion sekrete faras tiaj homoj, estas tiel hontinde, ke prefere oni eĉ ne parolu pri ĝi. 13 Ĉio kion refutas la lumo, fariĝas aperta. 14 Kaj ĉio aperta estas lumo. Tial oni diras: Vekiĝu, dormanto, leviĝu el mort' kaj super vi brilos Mesio<sup>21</sup>. 15 Do tre atentu, kiel vi kondutas: ne kiel stultuloj, sed kiel saĝuloj. 16 Eluzu la ĝustan momenton, ĉar estas tempo malbona<sup>22</sup>. 17 Tial ne estu malsaĝaj, sed provu kompreni kion deziras la Sinjoro. 18 Ne ebriiĝu per tro da vino<sup>23</sup>, kio kondukas al senbrideco, sed pleniĝu de l' Spirito. 19 Alparolu unu la alian per psalmoj, himnoj kaj kantoj inspiritaj de la Spirito. Plenkore kantu kaj ludu antaŭ la Sinjoro. 20 Ĉiam, antaŭ ĉio, en la nomo de nia Sinjoro Jesuo Mesio vi dankodiru al Dio, kiu estas la Patro.

### hejmaj kondutreguloj

21 Submetiĝu unu al la alia, pro respekto je Mesio. 22 La virinoj <submetiĝu> al la edzoj, kvazaŭ al la Sinjoro, 23 ĉar la virino estas la kapo de l' virino, kiel Mesio estas la kapo de l' eklezio. Li mem estas la savanto

<sup>21</sup> Jsa 26:19; 60:1.

<sup>22</sup> Ams 5:13.

<sup>23</sup> Snt 23:31.

<sup>24</sup> Gen 2:24.

<sup>25</sup> Elr 20:12; Rdm 5:16; Snt 6:20.

<sup>26</sup> Snt 13:24.

<sup>27</sup> Ijb 31:13-15.

de sia korpo. 24 Same kiel la eklezio submetiĝas al Mesio, tiel ankaŭ la virinoj submetiĝu en ĉio al la edzoj. 25 Viroj, amu viajn edzinojn, kiel ankaŭ Mesio amis la eklezion kaj transdonis sin por ĝi 26 por per akva bano kaj parolo sanktigi kaj purigi ĝin, 27 por konduki la eklezion al si en ĝia pompo, sen makulo aŭ haŭtofalto aŭ simile, sed sanktan kaj sendifektan. 28 Tiel same ankaŭ la viroj devas ami siajn edzinojn, kvazaŭ tiuj estus ilia propra korpo. Kiu amas sian edzinon, amas sin mem. 29 Neniu ankoraŭ malamis sian propran korpon: male, oni nutras kaj flegas ĝin, kiel ankaŭ Mesio la eklezion. 30 Kaj ni estas membroj de tiu korpo. 31 Tial la viro forlasos la gepatrojn kaj ligiĝos al la edzino, kaj tiuj du estos unu<sup>24</sup>. 32 Tio estas ega mistero. Mi mem aplikas ĝin al Mesio kaj ties eklezio. 33 Kiel ajn estu, ĉiu el vi amu sian edzinon kiel sin mem, kaj la virino respektu sian edzon. **6:1** Infanoj, obeu la gepatrojn [en la Sinjoro]; tio decas. 2 Honoru viajn gepatrojn, jen la unua ordo al kiu ligiĝas promeso: 3 por ke estu bone al vi kaj longe vi vivu surtere<sup>25</sup>. 4 Patroj, ne kolerigu viajn infanojn, sed eduku ilin en mesia disciplino kaj admono<sup>26</sup>. 5 Sklavoj, obeu viajn ĉi-terajn mastrojn respektive kaj inde, en kora simpleco, kvazaŭ <obeante> al Mesio. 6 Ne kiel okulservistoj homplaĉaj, sed kiel sklavoj de Mesio, kiuj volonte plenumas la volon de Dio 7 kaj kiuj bonhumore faras sian laboron, kvazaŭ estus por la Sinjoro kaj ne por homoj, 8 sciante, ke ĉiu de l' Sinjoro ricevas la bonon, kiun li faris, ĉu sklavo li estas ĉu liberulo. 9 Kaj vi mastroj, traktu ilin sammaniere. Preterlasu minacojn, konsciante ke enĉeile ili havas la saman Sinjoron kiel vi, kaj ke tiu ne distingas laŭpersone<sup>27</sup>.

### la armaĵo de Dio

10 Fine do, [gefratoj,] serĉu vian forton ĉe la Sinjoro kaj ties potencego. 11 Surmetu la armaĵon de Dio por povi rezisti la ruzojn de l' diablo. 12 Ĉar nia batalo ne direktiĝas kontraŭ sango kaj karno, sed

## TTT-EJO

Nia membro Jerry VEIT informas ke antaŭnelonge aperis sur la reto nova lia retpaĝaro kun la titolo „365 Tagoj el la Biblio“. Temas pri dulingva ttt-ejo kun legaĵoj el la Biblio en Esperanto, la angla kaj pli ol 30 aliaj lingvoj. Ĝi enhavas ankaŭ ĉiusemajnan biblian mesaĝon en Esperanto kaj 11 aliaj lingvoj, laŭtemajn legaĵojn el la Biblio en 10 lingvoj kaj multajn internaciajn ligilojn. Oni ankaŭ povas ricevi ĉiutage specialan mesaĝon el la Biblio en Esperanto pere de retroŝto. Haveblas ankaŭ presitaj broŝuroj pri kristanaj kaj vivhelpaj temoj en diversaj lingvoj. Unu el la celoj de la hejmpaĝo estas uzi Esperanton en la praktika religia vivo.

Venu kaj ĝin vizitu!

<<http://www.execpc.com/~jveit/>>

kontraŭ la princoj, kontraŭ la potencoj, kontraŭ la mondregantoj de ĉi tiu obskuro, kontraŭ la spiritoj de l' malbono en la ĉielaj regionoj. 13 Tial do ekkaptu la armaĵon de Dio por rezisti ilin je la tago de l' malbono, kaj por resti staraj, batalante ĝisfine. 14 Staru do, kun la vero kiel zono ĉe via lumbo, kaj vestitaj per justeco kiel kiraso<sup>28</sup>, 15 <sandale> kovrinte viajn piedojn per fervoro por la bona mesaĝo de l' paco<sup>29</sup>. 16 Ĉiam surhavu la ŝildon de la fido, per kiu ĉiujn brulajn sagojn de la malbono vi povos estingi. 17 Ankaŭ portu la kaskon de l' saviĝo kaj la glavon de la Spirito, t.e. la parolon de Dio<sup>30</sup>. 18 Preĝu kaj petegu en la Spirito je ĉiu okazo kaj ciamaniere. Por tio sisteme viglu kaj petegu Dion por ĉiuj sanktuloj. 19 <Preĝu> ankaŭ por mi, por ke doniĝu al mi la parolo, kiam la buŝ-

## VENU SPIRITO SANKTA

Venu, ni petas, Sankta Spirito, Ni sopiras al Via vizito, Sen Vi ni povas nenion fari, Bonvolu ĉe ni eterne stari. La promeson pri Vi ni ricevis, Kies plenumon ni multe revis, Ke Vi ja venos kaj nin konsolos, Kaj kiel Amiko bona rolos. La Promesint' forestas fizike, Sed kiel Li jam diris amike, Veninte Vi nin al l' vero gvidos, Kaj Vian nomon ni ade fidos. Venu! venu! ĉiu kor' atendas, Venu, peton al Vi ni nun sendas, Alie ni tute malsukcesos, Kaj nia rilato kun Di' ĉesos.

Pastoro Ōshó-Davies OLÚWÁBŪNMI

on mi malfermos, por ke kuraĝe mi konigu la sekreton de l' bona mesaĝo, 20 pro kiu mi estas sendito katenita. <Preĝu>, ke kuraĝe mi parolu ĝin, kiel estas mia devo.

### fino kaj benediziro

21 Por ke ankaŭ vi sciiĝu kiel mi fartas, ĉion rakontos al vi Tiĥiko, la amata frato kaj fidela diakono en la Sinjoro. 22 Ĝuste tial mi sendas lin al vi, por ke vi aŭdu kiel ni fartas, kaj ke li konsolu vian koron. 23 Pacon al la gefratoj kaj amon kun fido donu Dio la Patro kaj la Sinjoro Jesuo Mesio. 24 La graco estu kun ĉiuj, kiuj amas nian Sinjoron Jesuo Mesio, nepereeme!

<sup>28</sup> Saĝ 5:18; Jsa 11:5; 59:17.

<sup>29</sup> Jsa 52:7.

<sup>30</sup> Jsa 59:17.

# ESPERANTO EN 1999

## Denove du forumoj

Nia Esperantujo ne estas granda. En la nuna mondo, laŭ diversaj taksoj, nur inter 40 ĝis 200 mil personoj uzas Esperanton por interkomunikiĝo. Kaj la konscio pri nia reala amplekso iom post iom forpuŝas la propagandajn nombrojn (eĉ se Aldo DE GIORGI en la marta kajero de *Esperanto*, malgraŭ la scio pri la vera nombro — laŭ li, ne pli ol 200 mil — konfesis, ke li mem blufas pri milioj, kaj proponis al la aliaj kunblagi).

Ŝajnus nature, se tiu eta grupo da adeptoj de Esperanto starigus forumon por libere interŝanĝi ideojn kaj plani kunlaboron inter niaj asocioj, akademioj, fondaĵoj, gazetoj, turismaj oficejoj, ĵurnalistoj, eldonantoj, aŭtoroj, kulturcentroj, esperantistaj entreprenistoj, lingvistoj kaj aliaj (kun invito de neesperantistaj fakuloj pri lingvaj kaj sociaj demandoj).

Tiu forumo taŭgus por diskuti planojn kun konsidero de la interesoj de la „tuta” esperantista komunumo kaj formi laborgrupojn el anoj de diversaj organizoj por kune fronti aparte gravajn taskojn (informkampanjo internaciskala, sociologiaj esploroj, nova enciklopedio, internaciaj konferencoj).

Sed tia kunlaboro, kies neceson konscias ĉiu normala esperantisto, ŝajnas nereala pro la rivaleco de niaj gvidantoj, ties ambicioj kaj pro malsamaj konceptoj pri la rolo kaj loko de Esperanto inter niaj ĉefaj „partioj”.

Samkiel en 1998, ankaŭ en 1999 okazis du forumoj. La dua kunsido de la Strategia Forumo de la E-komunumo, okazigita de UEA, arigis en Berlino reprezentantojn de pli ol 50 establoj. Oni denove ne sukcesis formuli komunan starpunkton, eble ĉar la kunsido estis nur 2,5-hora, sed gravas, ke la

Berlina prelego de Kep ENDERBY vekis diskuton en nia gazetaro.

La dua Forumo de la Esperanta Civito (kadre de la 72a Kongreso de SAT, Karolovaro) havis malpli da partoprenantoj (8 pak-tintaj establoj kaj 3 observantoj) kaj pli da tempo (4 sesioj). Rezulte estis aprobata la projekto de Konstitucia Ĉarto de la Esperanta Civito proponita por dujara diskutado antaŭ la definitiva akcepto en la jaro 2001.

Al la ideologia diskuto kontribuis ankaŭ du studoj: „*Ĉu Esperanto postvivos la jaron 2045*” de Tazio CARLEVARO, kaj „*Esperanto sen mitoj*” de Ziko SIKOSEK. Jarfine formiĝis komisiono pri la nova strategia laborplano de UEA por prezenti en Tel-Avivo dokumenton anstataŭ Kampanjo 2000.

## Levi kaj influ

La supraj linioj koncernas la unuan taskon de Kampanjo 2000: „Levi la organizan kaj idean nivelon de la E-komunumo”. La du aliaj taskoj estas: „Levi la prestiĝon de la internacia lingvo” kaj „influi la internacian vivon” — informado kaj eksteraj rilatoj.

En la informado okazis nenio nova. UEA lanĉis informkampanjon en la islama mondo, sed ĝia efiko dume ne superas eĉ tiun de la artikolado de Viktor KUDR-JAVCEV (kelkcent varbitoj); la informado en Germanio estis pli vigla pro la kongreso, ktp. Nia informado plu dependas de centoj da lokaj aktivuloj; kaj en nia komunumo apenaŭ ekzistas sufiĉe da kunlaboremo kaj financo por mondskala kampanjo pri Esperanto. (La pasintjara precedenco AULD montras, ke Esperanto povas penetri en amaskomunikilojn sendepende de niaj planoj kaj kampanjoj.)

La Balkana konflikto respeguliĝis en Esperantujo per kelkaj rezolucioj ne aparte gravaj. Pli grava estas la **Agado Espero**, kiun iniciatis kaj tegmentis UEA, por helpi milit-

viktimojn. Precipe efika estis projekto „Mil familiaj pakajoj” de Humanitara Organizo Espero en Bosnio. Kadre de tiu projekto esperantistoj aĉetis ne mil, sed preskaŭ du mil (ekzakte 1998) pakajojn (ĉiu pakajo kostis 50 DEM), refoje pruvinte, ke ankoraŭ vivas la idealoj de ZAMENHOF kaj HODLER.

Laŭ iniciato de UEA, Internacia Konferenco de Neregistaraj Organizaĵoj starigis temgrupan sesion pri „**Lingvo kaj homaj rajtoj**”, kiu sub la gvido de Kep ENDERBY kaj post la enkonduka prelego de LEE Chong-Yeong unuanime rezoluciis pri rekomendo al EKOSOK diskuti lingvajn problemojn, fondi tiucelan komisionon kaj raporti pri la rezulto al la Ĝenerala Asembleo de UN. UEA partoprenis en kelkaj aliaj internaciaj konferencoj kaj aliĝis al la subskribado por Manifesto 2000 verkita de Nobel-pacpremiitoj.

ERA okazigis en la Eŭropa Parlamento seminarion „**De la kostoj de la (ne)komunikado al la organizo de lingva federaciismo**”, en kiu estis lanĉita projekto de ERA pri rajto al la internacia lingvo en la jaro 2020. IKEL plurfoje rezoluciis pri konfliktoj en la mondo. Esperanta PEN-Centro prezentiĝis en la monda kaj regiona konferencoj de PEN. Ekster-rilate aktivis Francio kaj Italio. Startis projekto „Indiĝenaj Dialogoj” por kunlaborigi per Esperanto organizaĵojn de indiĝenaj popoloj. Preskaŭ cent klasoj partoprenas en la projekto „Interkulturo” de ILEI.

## Neŭtraleco kaj homaj rajtoj

La eksteraj rilatoj de UEA kaj ties Unesko-eca eldonado, laŭ Kep ENDERBY, ne estas sufiĉa manifestiĝo de ĝia socikampa aktivado. En Berlino li publike proponis: *«ke UEA, pli senambigue ol nun, direktu sin al la protekto kaj progresigo de la homaj rajtoj ĝenerale.»* Laŭ li *«Se UEA irus laŭ tiu vojo, UEA povus pli ol nun diskoniĝi en la mondo, kun reputacio de asocio por homaj rajtoj kaj sociaj liberecoj, anstataŭ la*

*nuna reputacio de nur lingva asocio. UEA iĝus asocio por la homaj rajtoj, kiu uzas Esperanton, kaj kies politiko estus disvastiĝi Esperanton pli forte ol nun pere de ĉefa pledo pri homaj rajtoj aŭ, se vi permesas, civilaj liberecoj.»*

La propono de ENDERBY (kiun li faris en la rolo de la prezidanto de Esperanta Jura Asocio) trovis pozitivan reagon de pluraj aktivuloj, tamen ĝi implicas kelkajn problemojn, ekzemple:

— La statuto de UEA estas ambigua, kaj la prioritato al la homrajta aspekto neeviteble kolizios kun la statuta postulo pri neŭtraleco pri „sociaj kaj politikaj problemoj”.

— Nun la asocia financo prosperas, kaj la individua membraro estas stabila. Ĉu la esperantistaro donos subtenon al UEA kotize kaj donace, se tiu aktiviĝos socie kaj akceptos starpunkton pri aferoj politikaj laŭ la homrajta dimensio?

— UEA ne havas realajn konkurencojn en la neŭtrala E-movado. Pledante por „sociaj liberecoj” ĝi trovos sin en la kampo, kiun plugas SAT, ERA kaj IKEL.

— Se la respekto de la homaj rajtoj efektive (ne nur statute) determinos la pozicion de UEA, ĉu ĝi sukcesos „reveni sur la socian batalkampon” sen batali tiukampe kontraŭ la asocioj kaj gazetoj, kiuj subtenas malrespekton de la homaj rajtoj. Ekzemple, povos temi pri la pozicio de ĈEL kaj „El Popola Ĉinio” en la problemoj Tibeta kaj disidenta; pri la asocioj en Kubo kaj Serbio ne defendantaj la rajtojn de la subprematoj tie; kaj fine pri la reformulo de sia rilato al la personoj, kiuj kunlaboris kun (aŭ estis pagataj de) komunismaj reĝimoj en Sovetunio kaj Orienta Eŭropo. Kiel reagus la koncernaj aktivuloj kaj la reĝimoj, se al lokaj esperantistoj oni proponus partopreni en la homrajta agado kunlabore kun Amnestio Internacia?

La problemoj, kiujn eble kaŭzus ŝanĝo de la prioritatoj, estas aparte studendaj, sed la unua rezulto jam estas: Kep ENDERBY estas proklamita kiel „La Esperantisto de la Jaro”.

## Kongrese

La Berlina UK sukcesis pro la bona organizado, sukcesa informado kaj altnivela programo scienca kaj kultura. Duafoje okazis la kongreso Azia, kun senprecedenca subteno de la kongreslando Vjetnamio. Malpli amasa kaj malpli subtenita estis la kongreso Amerika. IJK-55 en Hungario iĝis la plej partoprenita IJK en la jaroj 1990aj. Dekoj da fakaj kaj landaj kongresoj kaj konferencoj estas apenaŭ listigendaj. Ili okazis, kaj multaj ŝatis ilin, kaj pri ili jam multe informis niaj amaskomunikiloj.

## Rete kaj gazete

Cetere estas rimarkeblaj ŝanĝoj en nia interna informado pro la teknologia evoluo. Interreto daŭre penetras en la vivon de la pli prosperaj landoj (kie loĝas la pliparto de niaj membroj, abonantoj kaj kongresanoj). Tio ja faciligis la laboron de la gazet-redaktoroj, kiuj povas preni informojn el la senpagaj ret-informiloj „Gazetaraj Komunikoj de UEA”, „Heroldo Komunikas” kaj „Interredaktore”.

Sed ĉar ankaŭ la ordinaraj legantoj nun povas facile kaj senpage ricevi informojn, la tradicia gazetaro devas trovi novajn formojn kaj manierojn de la informado kaj pres-tekniko. „Monato” sukcesis elkriziĝi per reinvito de Stefan MAUL kaj aldono de koloroj. „La Ondo” proponas senpagan literaturan suplementon. „Eventoj” kaj „Heroldo” spertis problemojn pri la eldonritmo kaj dufoje ŝanĝis siajn (vic)redaktorojn. Kolor-riĉajn kovrilojn ekuzis „Esperanto”, „Juna Amiko” kaj „Literatura Foiro”. Kaj pluraj gazetoj aperas ankaŭ rete.

Cetere rete estas aŭdeblaj pluraj radio-programoj per RealAudio. Tio koncernas ne nur la ŝtatajn, sed ankaŭ lokajn staciojn, kiuj antaŭe estis aŭdeblaj nur en sia regiono. Eĉ pli: kelkaj radioj aŭskultebblas nur rete.

Do, nia gazetaro konstatinde progresis pro la pli facile troveblaj informoj, kaj pro la konkurenco kun la reto,

kaj pro la drasta evoluo de la komposta kaj presa teknologioj.

## Literature kaj kulture

La teknologia evoluo faciligis ankaŭ la libroeldonadon, kaj nuntempe oni ne devas multon investi por prespretigi kaj presi libron. Laŭ „Laste aperis” en „Esperanto” ankaŭ en 1999 oni eldonis pli ol 200 librojn. Kaj ili estis bone aĉetataj: la libroservo en Berlino denove donis rekordan rezulton.

Tamen antaŭ eldoni libron, oni devas ĝin verki. Sed eĉ bona komputilo ne sufiĉas por verki bonan poemon aŭ novelon, kaj literature elstaras ne multaj el la eldonitaj libroj. Sed verŝajne proporcie simila situacio estas ankaŭ en aliaj lingvoj. Kiel la atuton de la jaro oni povas konsideri la novan tradukon de „Faŭsto” (Karl SCHULZE). Ĝojigis niajn legantojn „Alico en Mirlando” (CARROLL/BROADRIBB) kaj „Noveloj el antikva Ĉinio”; rapide elĉerpiĝis en Berlino la stoko de „La ŝtona urbo” de Anna LOEWENSTEIN. Posteume aperis „Kritiko kaj recenzistiko en Esperanto” de Karolo PIC.

Sed la plej bonvena libro en 1999 estis esaro „Lingva arto” dediĉita al la 75-jaraj jubileoj de Bill AULD kaj Marjorie BOULTON.

En la nelibra kulturo aparte prosperis la projekto „Kolekto 2000”, kadre de kiu estas eldonitaj jam 8 kompaktaj diskoj. Sed la plej granda muzika atingo venis el Germanio, kie grupo „Freundeskreis” produktis albumon „Esperanto”, kies 250 mil ekzempleroj jam vendiĝis.

### Bonan novan jaron 2000!

Aleksander KORĴENKOV  
(„La Ondo de Esperanto” 2000: N-ro 1)  
rete: <sezonoj@mail.ru>  
Interredaktore

# NOVJARA MESAĜO DE LA PREZIDANTO DE UEA

La simbole kaj emocie grava jaro 2000, ĉesoĵla al nova miljaro, donas al multaj homoj – signife pli ol aliaj jarkomencoj – emon kontempli la pasintecon, same kiel la estontecon. Cedante al la sama emo je tiu ĉi historia fojo, mi kaptu la okazon paroli – mi esperas, ne tro filozofie – pri kelkaj aspektoj de nia movado, de nia komunumo kaj de UEA mem, laŭ miaj observoj kaj spertoj dum mia ĝisnuna tempo kiel prezidanto de UEA.

Je la fino de la 20-a jarcento, eĉ se la revoĵo de niaj pioniroj pri Rapida Fina Venko ankoraŭ ne realiĝas, oni rajtas honeste kaj memfide diri ke la fenomeno Esperanto sendube sukcesis vivteni sin kaj progresi dum tiu ĉi tumultega jarcento, kies konjunkturoj certe ne helpis prosperi ideojn similajn al la nia.

Ni ofte aŭdas akuzajn demandojn: kial ni ne atingis pli? kial la entuziasmo kaj optimismo de niaj pioniroj plejparte velkis? Sed mi respondas per demando: ĉu ni vere rajtis atendi pli ol tio kion ni jam atingis? Se ni rerigardas al nia historio, la honesta respondo devas esti: ne; atendi pli estis utopie kaj tro optimisme.

Tamen, mi forte kredas ke ni rajtas eniri la novan jarmilon optimisme kaj kuraĝe, eble ne kun la espero atingi la samajn celojn, almenaŭ ne sammaniere kiel volis la pioniroj, ĉar iliaj celoj probable ne plu aktualas en la nuna mondo, tiom malsama al la ilia. Frontas nin, nuntempajn esperantistojn, tute alia mondsituacio. Konforme al ĝi, ankaŭ ni mem, niaj organizoj, niaj sintenoj kaj strukturoj devos ŝanĝiĝi. Fakte, en nia rapide ŝanĝiĝanta mondo ĉiuj organizoj kiuj volas ĝin iel servi, devas konstante sin reformi.

Ne konvenas en novjara mesaĝo pro-

funde trakti pri tio kiaj politikaj, taktikaj aŭ strategiaj ŝanĝoj estas dezirindaj, ekzemple, por UEA. Laŭlonge de la jaro, mi klopodos stimuleme fari kelkajn publikajn sugestojn. Konsekvencajn kritikojn kaj ideojn de ĉiuj interesatoj mi bonvenigas.

Tamen, mallonge kaj esence: kiajn problemojn de tiu speco mi vidas? Fundamente gravas la fakto ke dum la lastaj jaroj la ĝenerala publiko, precipe gejunuloj, ne multe interesiĝas pri Esperanto. Tio rezultas de la ĉiuhora inundo de tiel nomataj novaĵoj kaj komercocelaj allogaj distraĵoj kiujn la nuntempa publiko tutmonde konstante spertas, kun sinteno ofte priskribita kiel apatio. Esperanto de longe ne kvalifikiĝas kiel inda novaĵo, kaj certe ne kiel komerca logaĵo. Nia idealismo en la moderna mondo klare ne plu sufiĉas sola.

Ni ankaŭ devas kalkuli kun tio ke la antaŭjuĝoj kaj skeptiko de multaj elituloj kontraŭ ni daŭre restas.

Malgraŭ ĉio tio, nia unika Esperanta kultura vivo daŭre pliriĉiĝas kaj kvalite plialtiĝas. Nur unu ekzemplo: konstante eldoniĝas literaturaj verkoj altkvalitaj, tradukitaj kaj originale verkitaj.

Por progresigi nian aferon, ĉiu sin demandas: kion ni faru? Mia unua kaj plej ĝenerala sugesto estas ke ni strebu plifortigi nian internacian senton de kohereco, sed ne en spirito sekteca, maltolerema aŭ ofenda al aliaj, ĉu esperantistoj aŭ ne.

Due, por socia asocio kiu volas agi efike, ege gravas, evidente, la propra strukturo. Strukturo UEA, same kiel ĉiuj internaciaj organizoj, havas multajn problemojn jam pro la fakto mem ke ĝi laboras internacie. La komitatanoj kaj estraranoj de UEA, kvankam statute ili havas la

superan gvidrolon en la aferoj de UEA, necese impresas pli malfortaj kaj iom pli amatoraj ol la profesiuloj en la Centra Oficejo, ĉar la unuaj laboras en sia libertempo, dise tra la mondo. Tia kontraŭdira situacio kreas seriozajn problemojn – kiel en ajna asocio celanta agi kaj efike kaj demokratie – pri la kombino de efika gvidado kun efektivaj, ĝustaj, demokratiaj principoj de respondeco. Bedaŭrinde, akcepteblajn solvojn ne facilas trovi.

Trie, ni devas akcepti ke, kvankam la interpopola lingva problemo mondscale ege gravas, ĝi plejparte ne interesas la ordinarajn homojn.

### Do, ree: kion fari?

Mi sugestas ke, daŭre disvastigante la uzon de Esperanto per niaj tradiciaj metodoj, ni pliaktivigu en aliaj statute permesitaj aferoj, ekzemple, batalante por homaj rajtoj ĝenerale.

Kvankam pri certaj temoj ligas nin statute deviga neŭtraleco, la statuto permesas al ni, fakte eĉ kuraĝigas nin, tion fari. En niaj tiukampaj klopodoj, ni strebu mal-

pligrandigi la distancon inter la „skoloj“ por- kaj per-esperantaj de nia tuta movado kaj komunumo, kaj pli alproksimiĝi al la peresperanta flanko.

Sendepende de la demando de neŭtraleco, decidi pri la plej bonaj, saĝaj kaj prudentaj reagoj al multaj dornaj demandoj ĉiam restos problemo. Mi kredas ke, post pli ol cent jaroj, ni jam estas sufiĉe maturaj fari taŭgajn decidojn.

Ni ĉiuj ankaŭ iĝu pli toleremaj al la multaj diferencaj opinioj kaj tendencoj en ĉiuj vicoj de nia komunumo, kaj ni atente aŭskultu niajn kritikistojn.

UEA ne estas, kaj ne volas esti, la fonto de ĉiuj saĝoj pri la plej bonaj manieroj progresigi Esperanton kaj, pere de Esperanto, helpi la bonstaton de la mondo. Inkluzivemo, akceptemo, toleremo al ĉiuj fluoj de opinioj estu nia devizo.

Geomikoj, mi ne intencas prediki al vi. Fiere, memfide kaj ĉiatendence, ni marŝu antaŭen.

Mi deziras ke ĉiuj havu feliĉan novan jaron.

Kep ENDERBY (*Interredaktore*)

## KEP ENDERBY: ESPERANTISTO DE LA JARO 1999

La gazeto „*La Ondo de Esperanto*“ iniciatis en 1998 proklamon de „La esperantisto de la jaro“ kun partopreno de reprezentantoj de diversaj tendencoj en la Esperanto-komunumo kaj sendependaj kompetentuloj. Kiel la unua laŭreato pasintjare estis elektita skota poeto William AULD.

Por 1999 fare de 9 kandidatigantoj estis proponitaj 13 personoj, el kiuj 10 elektantoj povis elekti po 1 ĝis 3 personojn. Je la Zamenhofa Tago 1999 estis anoncita la rezulto de la voĉdonado:

Kep ENDERBY 6 voĉoj; Renato CORSETTI 4 voĉoj; N.I. SEQUOYAH 2 voĉoj; Marjorie BOULTON, Reinhard FOESSMEIER, Antonio HERRERA, Gbeglo KOFFI, Ilona KOUTNY, Geza KURUCZ, Mauro LA

TORRE po 1 voĉo.

Per tio aŭstralia juristo Kep ENDERBY, prezidanto de UEA kaj de Esperanta Jura Asocio, estas proklamita la esperantisto de la jaro 1999. Tiu ĉi proklamo rekonas la meritojn de Kep ENDERBY en la fortikigo de Esperantujo (aktiva partopreno en multaj kongresoj kaj tre grava parolado en la Berlina kunsido de la Strategia Forumo de la Esperanto-komunumo) kaj en la eksteraj rilatoj (precipe pro la sukcesa aktivado en la Internacia Konferenco de Neregistaraj Organizaĵoj en Seŭlo).

Halina GORECKA, sekretario  
„*La Ondo de Esperanto*“  
<sezonoj@mail.ru>  
*Interredaktore*

## MESAĜO AL IU INFANO EN LA MONDO

Tiu ĉi suba mesaĝo estas skribita de infanoj kiuj deziras interŝanĝi kun infanoj el la tuta mondo. Se vi ne instruas al infanoj, vi certe konas kelkajn infanojn. Por viaj najbaroj kiuj ne konas la esperantan lingvon vi povas traduki, kaj la infanoj povas respondi per sia propra denaska lingvo. En la urbo CHATEAUROUX (en la centra parto de FRANCIO) estas multaj lingvoj parolataj, ni certe trovos tradukantojn. Viaj skribitaj respondoj kaj

viaj desegnaĵoj estos multvaloraj por la infanoj kiuj skribis la tekston kaj por nia movado.

Respondu al ili.

Sendu la mesaĝon al aliaj infanoj.

Dankon

Maryvonne

<maryvonne.houviez@wanadoo.fr >

P.S. Mia interreta leterkesto povas ricevi respondojn. Mi transdonos ilin al la infanoj.

### Mesaĝo al iu infano en la Mondo

Ni estas 5 infanoj, naskitaj en urbo CHATEAUROUX, la 20-an de novembro 1989, la saman tagon kiam estis subskribita la unua Internacia Konvencio pri la Rajtoj de la Infano, en NOV-JORKO.

Ni estas multŝancaj, ke ni naskiĝis ĉi tie, ĉar al ni mankas nenio. Ni frekventas la lernejon, kaj ni havas ankaŭ tempon por ludi, sporti, aŭskulti muzikon, ktp...

Tamen ni scias, ke en la Mondo, multaj infanoj ne havas tiun ŝancon. Kelkaj el ili mortas pro malsato aŭ pro malsanoj, kiujn oni povus kuraci aŭ eviti; aliaj infanoj estas devigataj labori, ĉar iliaj gepatroj estas tro malriĉaj; krome aliaj suferas pro ekstremaj perfortaĵoj.

Okaze de la 10-a datreveno de la Konvencio pri la Rajtoj de la Infano, ni deziras sendi al ĉiuj infanoj en la Mondo, mesaĝon de Amikeco, Paco kaj Espero. Ni ŝatus, ke en la komenco de la 3-a jarmilo, la tuta Mondo agus por ke ĉiuj infanoj, senescepte, povu esti ŝirmataj, kontraŭ ĉio, kio malebligas al ili ĝui, kiel ni, veran vivon de infano sur planedo, kie fine, daŭros Paco, Justeco, kaj Solidareco.

Se vi esperas, kiel ni, iam vivi en tiu Mondo de niaj revoj, kaj deziras fari ĉion eblan por entrepreni; kunagi, kaj sukcesigi tion, redaktu viaŭvice vian propran mesaĝon, kaj sendu ĝin al ni:

Enfants d'Ici et d'Ailleurs  
(Infanoj de ĉi tie kaj aliloke)  
Maison des Droits de l'Enfant  
(Domo de la Infanaj Rajtoj)  
28, rue de l'Echo 36000 CHATEAUROUX  
France

Antaŭdankon.

Aurore, Cécile, Djane, Elodie et Simon

P.S. Vi povas ankaŭ sendi vian mesaĝon al aliaj infanoj. Ĉiuj kune, la mano en la mano, ni movos la Mondon.

Maryvonne HOUVIEZ, 89 rue du 3ième R A C,  
36000 Chateauroux, France  
tel. 33(0) 254 279 551, fax 33(0) 254 271 968,  
Retadreso: <maryvonne.houviez@wanadoo.fr>  
<http://perso.wanadoo.fr/jean-marie.houviez/>

## Por doni al vi estontecon kaj esperon

Kara membro de KELI! Kara abonanto! Kara leganto!

Akceptu korajn salutojn ĉe tiu nekutima sojlo, ne nur de unu jarcento al la alia, sed eĉ de unu jarmilo al la alia (matematike ni ja devus atendi kroman jaron, mi scias, sed tamen!). Multaj homoj sentas grandan eksciton, ne nur pro ebla fiasko de komputila programo. Post la pordo ŝajnas kaŝiĝi io nova, nekonata, alispeca, timiga aŭ esperiga.

Ĉu vere? Mi supozas, ke ankaŭ post la magia dato ni travivos normalajn zorgojn kaj ĝojojn kiel antaŭe, solvos unu problemon kaj fiaskos pri alia. Eble vi rifuzos tian sobran vidmanieron kaj preferas iom da sentimentaleco. Nu, kial ne. Sed mi memoras, kiam mi estis studento en Usono, kun kia subrideto oni parolis pri siaj „novjaraj rezolucioj” – sinceraj intencoj kion nove fari kaj energie ataki en la nova jaro – kaj post kelkaj tagoj ĉio estis forgesita.

Por kristana Esperantisto estas punktoj, kiuj ne dependas de tia specifa dato, sed estas multe tro gravaj por rapide forgesiĝi. Se la komenco de nova jarmilo tamen liveras okazon por iom pripensi pli ol kutime, des pli bone.

Esperanto ĝenerale kaj kristana esperantismo por pli malpli ĉiu el ni estas io akcesora, io flanka. Eble ĝi ja ludas gravan rolon. Mi mem havus tute alian biografion, se mia gimnazia instruisto pri klasikaj lingvoj ne avertus kontraŭ la „tro facila lingvo, kiu ne ŝlifas la spiriton” kaj tiamaniere vekis tiun mian intereson, kiu ne velkis en la daŭro de pli ol duona jarcento. Tamen ĝi ne estas necesa por la ĉiutaga vivo. Por resti ardanta la karbo bezonas aliajn karbo-pecojn. Nur tiel la fajro ne estingiĝas. Niaj kongresoj kaj konferencoj eminenta rolas en tiu viva in-

terŝanĝo de spertoj kaj homaj valoroj. Sed ankaŭ nia modesta gazeto *Dia Regno* klopodas ludi tian rolon. Kiom ĝi sukcesas, certe ne dependas nur de unuopuloj, sed de ĉiu kiu aktive aŭ pasive, verkante kaj legante partoprenas la aventuron.

Nova jaro aŭtomate signifas, ke ĉiu el ni senescepte fariĝis, denove, unu jaron pli aĝa. Se ni povas vidi krizon en la evoluo de KELI, ĝi devenas el tiu komuna sorto de ĉiuj homoj. Ni perdas membrojn, ne pro seninteresiĝo, ne pro kabeiĝo – sed pro tiu natura proceso. Kaj efektive mi devas diri, ke mi havis tute aliajn esperojn, kiam mi antaŭ jardekoj akceptis la inviton de la tiama KELI-sekretario Dirk DE BOER transpreni la prezidantecon de KELI. Tiam mi ne imagis, ke ĉe la fino de mia lasta deĵorperiodo (1998-2000) la membraro estos ŝrumpinta al nura triono de tiu kulmina epoko. Malgranda estas la konsolo, ke ni en tio partoprenas la sorton de la Esperanto-movado ĝenerale – kiam mi aliĝis al Germana Esperanto-Asocio, ĝi havis pli ol 10 000 membrojn! Restas unu el la grandaj enigmoj, kial ni ne sukcesis kaj ne sukcesas, nek mi nek iu alia, enverŝi al la juna generacio de kristanoj tiun entuziasmon, kiu animis nin kaj kiu necesas por pionira afero.

Mi plu rezistos al ĉia defetismo. Legante la libron de mia antaŭulo H.A. DE HOOG „Nia Historio” pri la unuaj kvindek jaroj de KELI, mi ne ĉesas miri pri la kuraĝo de niaj veraj pioniroj. Ili persistis, kiam prudentaj homoj povus nur admoni ilin kaj diri: „Kontentiĝu, vi havis belan ideon kaj altan idealon, sed nun ne estas tempoj por idealoj. Turnu vin al aliaj aferoj”. Ankaŭ nun abundas aliaj taskoj. Sed ĉu vere unu

elkludas la alian? Ĉu lasi Esperanton favore al alia socie utila agado? **E-vid-ent-e**, la iama Agado E3 de Vera kaj Jacques TUINDER estas por mi la plej luma ekzemplo, kiel kombini ambaŭ – la necesas, kuracebla kaj preventebla blindeco en la mondo venis al la atento de almenaŭ nombro da homoj pere de Esperanto, kaj la Blindula Helpo en la spuroj de la Varsovia okulisto Lejzer ZAMENHOF jam estas grava parto en la historio de kristana esperantismo kaj samtempe daŭra tasko por ankoraŭ longa estonteco.

Kompreneble ankaŭ kvanto gravas. Sen sufiĉe da abonantoj kaj membroj, kiuj pagas siajn kotizojn kaj donas siajn donacojn, ne eblas aperigi la interligilon, kiu reciproke fortikigas kaj kuraĝigas. Sed pli gravas kvalito. Kaj mirakle ni ĉiam havis la homojn kiuj estis pretaj fari difinitajn taskojn, ofte dum jaroj kaj jardekoj, sen ia mona rekompenco, iafoje preskaŭ sen eksplicita danko (iom malica ŝvaba diraĵo: „ne grumbli estas sufiĉe klara danko”). Por bone fari nian taskon ekzemple okaze de universala, landa aŭ faka kongreso multe pli gravas kelkaj personoj surloke por prepari Diservon aŭ kunvenon, por deĵori ĉe inform-stando okaze de grandaj kunvenoj kiel *Kirchentag* aŭ *Katholikentag*, ol impona membronombro.

Jes, nin komencas turmenti la aĝo. Mi ne havas kialon por plendi. Sed mi jam pli frue diris, ke atinginte 70 jarojn en 1999, mi ne plu estos kandidato por la prezidanteco. Volonte mi plu kunlaboros en la estraro, volonte mi donos mian forton dum mi povas en la Ekumena Komisiono. Volonte mi helpos kompletigi kaj fini la liturgian libron *ADORU*. Sed ne nur mi, sed ankaŭ aliaj avizis, ke post fino de la regula deĵorperiodo ili preferas vidi aliajn nomojn. Mi havas sur mia tablo liston kun nomoj, el multaj landoj kaj eklezioj. Mi nun ne mencias eĉ unu. Sed mi petas ĝuste vin, kiu nun legas ĉi linion, esplori vian internon kaj diveni, ĉu eble via nomo estas sur tiu listo. Kaj se vi sentas la blovon de la spirito, preferu ne atendu tro longe, sed komuniku

vian respondon (eĉ se negativan, sed preferu jesan!) al iu estrarano, kiun vi aparte fidas. Tiam kun malpli da zorgoj kaj pli da ĝojo KELI eniros la novan jarmilon.

Kvankam mi nun skribas mian lastan novjaran saluton kiel via prezidanto, mi nun volas nek adiaŭi nek verki resumon de ĉiuj spertoj. Al ĉiu, kiu sentas ke stagno kaj regreso formangas ĉiujn sukcesojn, mi tamen preterpase menciui almenaŭ kelkajn erojn el la ĵus pasinta jaro, kiuj instigas al danko kaj espera fido: La ĵus aperinta germanlingva libro de Ulrich MATTHIAS (*Esperanto, la nova latino de la eklezio*) vekas viglan eĥon en rondoj, kien nia voĉo kutime ne penetras – ĉar la ne-esperantistoj ne povas legi niajn belajn rakontojn kaj argumentojn. De naŭ jaroj regule aperas la kvaronjara „*Oekumenisches Esperanto-Forum*” – kun duobla eldonkvanto ol *Dia Regno*, sen fiksa abono, nur per donacoj. Okaze de la granda *Kirchentag* en Stuttgart okazis Ekumena Diservo dulingva, tre bone vizitata. La Katolika Foiro 2000 en Hamburg unuafoje enhavas en sia oficiala programo la temon „Esperanto, ĉu la nova latino de la eklezio?”. Lige kun tio mi konstatas, ke preskaŭ ĉio menciinda dum la pasintaj kelkaj jaroj okazis en frateca kunlaboro inter KELI kaj IKUE. Nek unu nek la alia povas sola bone plenumi ĉiujn taskojn. Iaforte preferindas aŭ eĉ necesas aĝi aparte. Sed eĉ tiam, la aliaj iel spirite ĉeestas.

Mia eklezio elektis kiel moton por la Jaro 2000 tekston el la profeto Jeremia (29:13). Ĝi indikas la direkton, kiun ni kune sekvu: Salute mi citas iom pli (29:11-14): „*Ĉar mi scias la intencojn, kiujn mi havas koncerne vin, diras la Eternulo, intencojn al bono kaj ne al malbono, por doni al vi estontecon kaj esperon. Vi vokos al Mi, kaj vi iros, kaj vi preĝos al Mi; kaj Mi aŭskultos vin. Vi serĉos Min, kaj trovos, se vi serĉos Min per via tuta koro. Kaj mi estos trovita de vi, diras la Eternulo*”.

Frate via

Adolf BURKHARDT 15



# TEMPO, TEMPOJ

Jen nun ni troviĝas je dato, pri kiu oni multe parolis. Oni eĉ disputis, por scii ĉu la nova jarcento, aŭ la nova jarmilo jam komenciĝus aŭ ĉu estus necese atendi unu plian jaron (interkrampe, efektive, ni devos atendi tutan jaron).

2000. Klara nombro. Impresa. Sed, tamen, ĉi tio estas nur punkto en la daŭro de la tempo, markita momento, sed pasanta momento.

Mi ne tro tedos vin (kaj mi ne tro kompetentas cetere) pri la diversaj aspektoj de la tempo, laŭ literatura, filozofia, psikologia, fizika, teologia, mitologia vidpunktoj, kaj mi certe forĝis kelkajn. Temos do pri rapida, supraĵa trarigardo. Supozeble, vi rapide komprenos, kien mi volas iri.

Mi komencos per la konscio, kiun oni povas havi pri la tempo. Ĝi certe dependas de la psikologia stato de ĉiu, pri ties zorgoj. La tempo de tiu, kiu vivas en nature aŭ milite damaĝita domo, ne estas la sama, kiel la tempo de loĝanto en funkcia domo. La tempo de la suferanta malsanulo ne estas la sama, kiel tiu de la ludanta infano. La tempo de tiu, kiu havas plenumendan projekton, ne estas la sama, kiel tiu de tagnokte vivanta laŭ laboro, transporto, ripozo. Ĉiu havas percepton propran pri la tempo, eĉ kiam fakte ĝi estas la sama por ĉiu.

Laŭ ke oni vivas esperon aŭ malesperon, timon aŭ senzorgecon, oni vivas la tempon blue aŭ nigre, ĝi antaŭeniras malrapide aŭ tro rapide. Kia estas via tempo? Konsistanta el espero aŭ malespero? El senzorgeco aŭ timo?

Sciencfikcio alktimigis nin al konsidero de la vojaĝo tra tempo. Sed, la scienculoj ekevidentigas neeblecojn. Kelkaj fizikaj principoj, kiel la termodinamika entropio, igas la aferon tre malprobabla. Sekve, ne estas eble reveni malantaŭen por fari, ke tio kio estis ne plu estu, aŭ ne

estu kiel ĝi estis.

Sed tamen, kiel ni ofte volus ke la misfariĵoj povus esti refaritaj, ke la stultaĵoj, la malbonagoj estu nuligitaj! Sed, jen, tio ne eblas. Ni devas respondeci. Respondeci pri tio, kio ni estas, kion ni faris aŭ diris, kion ni ne faris aŭ ne diris. Prelegi pri niaj malsukcesoj, tio nu povas eviti la ripeton, ne povos modifi la definitivajn. La vera demando ĉiam restas: Kaj nun! Kion ni faras? Kion mi faras?

Sed tio supozigas, ke nia rigardo estu al la estonteco, kaj ne al la pasinteco. Kaj ni revenas al la antaŭa problemo.

En nia okcidenta civilizo, oni priskribas la tempon, kiel disvolvante en preciza direkto de la pasinteco al la futuro. La futuro troviĝas antaŭ ni, onidire. Sed, ekzistas kulturoj, kie ĝuste la pasinteco troviĝas antaŭ ni, ĉar ĝin ni povas vidi. Ekzistas aliaj kulturoj, kie la tempo, cikla, regule revenas, kaj jen la pasinteco estas ankaŭ la futuro, kaj reciproke, neŝanĝebla. La nuntempaj fizikaj teorioj ankoraŭ ne fiksiĝis rilate al antaŭ kaj post. Vi certe aŭdis pri la teorio de la „Big Bang”, eka eksplodo origino de nia universo, de la tuta materio de nia universo, kaj sekve ankaŭ de nia tempo. Se nia tempo havas komencon, ĉu ĝi havas antaŭon? Eĉ, ĉu la demando havas signifon? Kaj, se nia universo finiĝos en „Big Crunch”, ĉu troviĝos posto?

Kaj Dio pri ĉi tio? Se Dio troviĝas aliloke, kia estas lia tempo? Pri tio ankaŭ la teologoj prezentis tre diversmaniere la rilatojn de Dio kaj la tempo. Aŭ li estas ekstertempa, super ĉio, ĉion scianta, nian antaŭon kaj nian poston. Aŭ, kaj mi emas preferi ĉi tion, li enplektiĝis en en nian historion, en la historion de la homoj, en nian personan historion, ĉies. Kaj tio supozigas, ke certamane, li situas en la tempo, ene de la tempo, de nia tempo de nia universo, sed ne estante submetita, ne es-

tante kondiĉita al ĝi. Ne evidenta temo.

Kiel ni vivas tiujn aferojn? Kiun efekton povas havi sur nia vivo la rilato de Dio al la tempo? Eble, neniu, se ni decidis ke pri Dio ni tute ne zorgas, pri neniu ajn dio cetere. Tiam ni devas elturniĝi kun nia tempo, kun nia pasinteco kaj ĝiaj konsekvencoj, kun nia futuro kaj ĝia konstruo. Aŭ eble, la ĉioscianta rigardo de Dio terurigas nin, ĉar ni scias ke li scias, eble eĉ pli mem ol nia konscienco, estante fokusitaj pri nia pasinteco, terurigitaj krome per la futura nekono. Ĉar, se Dio troviĝas super kaj ene de la tempo, li konas nin, eĉ pli bone ol ni mem.

La biblia vortostoko konas du specoj de tempo, cetere kaj en la hebrea kaj en la greka. Tempo, la tempo, perpetua, kiu havas nek komenciĝon nek finiĝon. Tio povas esti la eterneco, tio povas esti la antikva tempo, iam, antaŭe, iufoje... Kaj estas la nuna tempo, la preciza momento, la daŭro de evento, la favora tempo, la tago de la Eternulo. Pri tiu parolas la Predikanto, kiam li diras ke troviĝas unu por ĉiu afero. Tiun oni markas por rememorigi eventon

Troviĝas tiuj, kiuj vivas en la minuto, nune, kaj tiuj kiuj perdiĝis en sia iamo, aŭ en siaj revoj. Ĉu la fido estas neŝanĝebla fido aŭ vivanta fido? Certe iom el la du.

Sed la intervenoj de Dio en la historion de la homoj fariĝis je precizaj momentoj, per precizaj agoj: la foriro de Abraham, la eliro el Egiptio, la reveno el ekzilo, la vivo, la morto kaj la releviĝo de Jesuo, Pentekosto. Kaj ĉiufoje, Dio donas novan starton. Ne temas pri ripetiganta ciklo, temas efektive pri nova starto.

Kaj ĉi tiuj momentoj estas tiel gravaj ke la kredantoj celebras ilin, ne ĉefe por marki la tempoj, sed pli por rememorigi la intervenon de Dio. La juda kalendaro enhavis plurajn festojn, kiuj ne havis (almenaŭ oficiale) magian, operacian, karakteron, sed estis privilegiaj momentoj por rememorigi, do signifi, la pretecon de Dio. Komence de la kristana historio, dimanĉo, la unua tago de la semajno, rapide fariĝis la

tago por rememori la morton kaj la releviĝon de Kristo. Pli poste, en la 2-a jarcento pri Pasko, la 4-a pri Kristnasko, oni retenis ankaŭ tagojn pli markitajn en la jaro. Sed ĉiam temis pri rememoraĵojn tagojn. Celebri ilin alportis nenion.

Niaj katolikaj fratoj ekkomencis apartan jaron, el kiu ili faris jubileon. Sed ŝajnas al mi, ke ili prenis la temon de la jubileo iom inverse al la Malnova Testamento. Ĝi estis liberigo de la ŝuldoj de la aliaj, de la sklavoj, reveno en la bienon. Ili faris el ĝi okazon de elaĉeto por si mem, periodo de indulgenco.

Se, prefere en ĉi tiu jaro, ili rememorus, ke Dio intervenis en la homan historion, ne kompanse al homaj agoj, kiel ajn meritoplenaj ili povus esti, sed efektive per graco, per amo. Se la liberigo, kiun oni neniam povos akiri al si, estus komprenata kiel venanta el Dio, nur kaj senpage, tiam ĉi tiu evento estus por ĉiuj jubileo, liberiĝo.

Ĉu oni prenas la tempon, kiel literaturan temon, oni konstatas, ke ĝi estas plejofte traktata kiel malamiko, ke ĝi estas la fuĝanta, la detruanta, la kondukanta al maljuneco. Kaj eblas tiam observi la diversajn sintenojn, kiujn la homoj havas antaŭ ĉi tiu fatalo. La rezignacio: tiel estas. La rememoro: bele estis. La ribelo, la rifuzo, aŭ la neado. Aŭ la preteriro per arto. Sed, ĉiamaniere la nevideblo restas.

Sed, la kredanto, antaŭ la tempo, kiel ĝi vivas? Kion proponas la fido al tiu, kiun la fuĝo de la tempo, la premo de la pasinteco kaj la nekono de la estonteco premas?

Mi revenas al Dio. Unu el liaj karakterizaĵoj, unu el liaj atributoj, estas ligita al la tempo. Temas pri la pacienco. Dio scias atendi. Al la homo ĉiam urĝas. Lia tempo estas kalkulita. Ne tiu de Dio.

Tial, kiam li alparolas la homon, li ne parolas pri ties pasinteco, li ne donas rendevon, sed li parolas pri la nun. Nun estas la favora momento.

Al la homo remaĉanta sian pasintecon, li diras: „rilate pasintecon, Jesuo

mortis kaj releviĝis, rilate nunon, vi povas rekomenci vian vivon, ĉi tiam, ĉi tie, ĉi tiel. Tutsimple”.

Ĝi estas ĉi tie, la amo de Dio. Kion vi faris, kaj kion vi povus fari, tio ne valoras. Nur valoras lia amo, lia graco. Via tempo povas reiri, nun. Kion vi faros nun, vi ne faros cele al akiro de io, sed ĉar vi ricevis de Dio.



+ Memore al Oswald CHAMBERS, 15.11.1917 +

## NE ADORKLINIĜU ANTAŬ VIA LABORO

„Ĉar ni estas kunlaborantoj kun Dio”.  
I. Kor. 3:9

Estu singarda kontraŭ ĉiu laboro por Dio, kiu permesas vin eviti la koncentriĝon je Dio. Tre multaj kristanaj laborantoj adorkliniĝas antaŭ sia laboro. La sola zorgo de la laboranto devas esti la koncentriĝo je Dio. Tio signifas, ke ĉiuj aliaj aspektoj de la vivo — ĉu intelekta, ĉu morala, ĉu spirita — liberiĝos kun la libereco de infano, tio volas diri, la libereco de Diadoranta, ne de obstina infano. Laboranto, kiu vivas sen tiu superreganta koncentriĝo je Dio, riskas la danĝeron, ke lia laboro fariĝos tro peza ŝarĝo por li. Neniu kampo de la korpa, mensa aŭ spirita aktiveco estas tiam libera, kaj sekve li elĉerpiĝas kaj plenlaciĝas. Por tia homo ne plu ekzistas iu libereco, iu ĝojo en la vivo. La nervoj, la menso kaj la koro tiom peziĝas pro zorgo, ke la benoj de Dio ne povas resti sur li. Sed same vera estas la mala situacio — kiam oni koncentriĝas je Dio, tiam ĉiuj kampoj de la vivo liberiĝas kaj falas sub la regadon de Dio sole. La respondeco por la laboro ne plu premas sur vin; via sola respondeco estas vivi en konstanta aktiva kontakto kun Dio, kaj ne permesi, ke io ajn malhelpu vian kunlaboron kun Li. La libereco, kiu venas post la konsekriĝo, estas la libereco de infano; la aferoj, kiuj antaŭe subpremis vian vivon, ne plu ekzistas. Sed vi ne forgesu pri tio,

La festoj: bone. La celebroy: bone. La revenantaj datoj: bone. Por rememorigi la momentojn, kiam Dio intervenis. Ni reiru kun li.

Bonan novan jaron, 2000! La ĝusta momento.

Philippe COUSSON  
(laŭ propra prediko)

ke via liberiĝo servas al nur unu celo — al la plenkora dediĉo al via Kunlaboranto, Dio.

Ni havas la rajton nek juĝi pri tio, kien Dio metu nin, nek antaŭpensi, por kiu tasko Li kapabligu nin. Dio ĉion direktas; ne gravas, kien ajn Li metos nin, nia unusola granda celo estas plenanime dediĉi nin al Li en ĉiu ajn laboro, kiun Li donos al ni. „Kion ajn via mano povas fari laŭ via forto, tion faru”.

El la libro *My Utmost for His Highest*  
(Mia plejforto por la Plejaltulo)  
de Oswald CHAMBERS\*  
(el la angla tradukis Jerald VEIT)

\*Oswald CHAMBERS (1874—1917) estis predikanto kaj misiisto. Li naskiĝis kaj plenkreskiĝis en Skotlando kaj lia misia kaj instrua laboro portis lin ĝis Usono kaj Japanio. Dum la Unua Mondmilito li servis kiel pastoro ĉe la aŭstraliaj kaj novzelandaj trupoj en Zeitoun, Egiptio. Tie li mortis la 15an de novembro 1917 post operacio pro apendicito. Post la morto lia edzino Biddy, profesia stenografistino, kompilis liajn predikojn kaj paroladojn libroforme. Lia plej fama libro, *Mia plejforto por la Plejaltulo*, aperis en Usono en la jaro 1935 kaj ekde tiam restas unu el la klasikaj verkoj de la anglalingva kristana literaturo.

## RECENZOJ

### VOJSERĈA VERKO PRI LINGVOPOLITIKO

POR AKTIVA LINGVOPOLITIKO. *Aktoj de la lingvopolitika seminario en la 81-a UK de Esperanto*, Prago 1996. Red. D. BLANKE, R. MCCOY kaj O. BULLER. Rotterdam: UEA 1999. 71p. ISBN 92 9017 062 X. 21cm. Prezo: EUR 7,10.

Ĉu ni bezonas lingvopolitikon? Kio fakte estas lingvopolitiko? Ĉu ĝi estas necesa nur por UEA, la ĉefa reprezentanto de la Esperanto-komunumo, aŭ ĉu ĝi devus koncerni la tutan komunumon? Ĉu por la konceptado kaj plenumado de nia lingvopolitiko eblas lerni el la spertoj de naciaj lingvoj?

Pri tiuj temoj diskutis la lingvopolitika seminario de UEA en la Praga UK en 1996. UEA ĵus eldonis libroforme ĝiajn materiaĵojn, por ke ili povu esti bazo por plua lingvopolitika aktivado.

Krom la antaŭparolo de Detlev BLANKE, „Por aktiva lingvopolitiko” enhavas ses kontribuojn. Humphrey TONKIN faras ĝeneralan enkondukon al la koncepto de lingvoplanado. Yamasaki SEIKO kaj Amri WANDEL skribas pri la lingvoplanadaj spertoj en siaj propraj lingvoj, respektive la japana kaj la hebrea. La tiama prezidento de la Akademio de Esperanto, Werner BORMANN, inventaras la aktualajn defiojn al tiu lingva institucio. Kun multaj ekzemploj Renato CORSETTI esploras la kreoliĝon de Esperanto, t.e. la streĉitecon inter personaj gustoj kaj oficialaj normoj. Fine, Detlev BLANKE resumas la seminariojn diskutajn en analiza artikolo pri la taskoj, kiujn nia lingvopolitiko frontas aŭ devus fronti. BLANKE klopodas ankaŭ difini, kiuj estu la plenumantoj de tiuj taskoj.

Gazetara komunikado de UEA  
Interredaktore

## FURORA LIBRO PRI RASISMO NUN EN ESPERANTO

Paĉjo, kio estas rasismo? Tahar BEN JELLOUN (1944). El la franca trad. Armela LEQUINT kaj Ĵak LE PUIL. Rotterdam: UEA 1999. 52p. ISBN 92 9017 063 8. Prezo: EUR 6,50. Triona rabato ekde tri ekz. ĉe UEA.

Sojle de la jaro 2000, la Internacia Jaro de la Kulturo de Paco, aperis ĉe UEA bonega libro pri unu el ĝiaj plej gravaj subtemoj, edukado al toleremo kaj respekto de diverseco. La franclingva originalo de „*Paĉjo, kio estas rasismo?*” („*Le racisme expliqué à ma fille*”), aperinta en 1997, fariĝis enorme populara.

La aŭtoro de la libro, Tahar BEN JELLOUN, naskiĝis en 1944 en Maroko. Ekde 1971 li vivas en Francio. En 1987 li ricevis la plej prestiĝan literaturan premion francan, Premion Goncourt, pro sia romano „*La sakrala nokto*”.

Pri la ekesto de „*Paĉjo, kio estas rasismo?*” la aŭtoro skribas: «*Infano estas scivolema. Ĝi faras multajn demandojn kaj ĝi atendas precizajn kaj konvinkajn respondojn. — Akompanante min al manifestacio kontraŭ leĝo pri enmigrado, mia filino demandis min pri rasismo. Ni multe interparolis. La infanoj pli bone ol iu ajn komprenas ke oni ne naskiĝas rasista sed iĝas tia. Foje. Per ĉi tiu libro mi provas respondi la demandojn de mia filino. Ĝi celas la infanojn kiuj ankoraŭ ne havas antaŭjuĝojn kaj volas kompreni. Pri la plenkreskuloj, kiuj ĝin legos, mi esperas ke ĝi helpos ilin respondi la demandojn, pli embarasajn ol ni kredas, de siaj propraj infanoj.*»

Armela LEQUINT kaj Ĵak LE PUIL transdonis al internacia leganto la verkon de Tahar BEN JELLOUN en klara kaj facilflua Esperanto.

Gazetaraj komunikoj de UEA  
Interredaktore

# Kotizoj de KELI por la jaro 200

Individua membro (kun DR)	15,00 EUR
Familia membro (sen DR)	2,00 EUR
Subtenanta membro (kun DR)	22,00 EUR
Dumviva membro	300,00 EUR
Abono DR (sen membreco)	12,00 EUR
KELI-anoj rajtas aboni „Espero Katolika“ pere de la KELI-kasisto	12,50 EUR
IKUE-anoj rajtas aboni „Dia Regno“ pere de C.O. de IKUE	7,50 EUR
Aerpoŝta sendado al ekstereŭropaj landoj (aldone)	3,00 EUR

## Pagmanieroj

1. Pere de landa kasisto/reprezentanto (vidu ĉi sube);
2. Poŝtĝire al Universala Esperanto-Asocio, Rotterdam por KELI-konto kelk-p en Belgio: 000-1631831-97 Germanio, Köln: 3182 91-509, BLZ 370 100 50 Nederlando: 378964 Svedio: 74374-0 Svislando (Bulle): 12-2310-0
3. Poŝtĝire al la KELI-konto Nederlando 5506132 (el ekster NL aldonu pro bankkostoj 3,00 EUR);
4. Per via konto ĉe UEA, al la KELI-konto kelk-p
5. Per internacia poŝtmandato, adresita al la KELI-kasisto
6. Per okcidentaj monbiletoj, senditaj al la KELI-kasisto.

## Landaj kotizoj en 2000

<b>Bulgario</b> *)	
Peranto: Hristo Dimitrov, str. Stracin 16, 7300 Kubrat.	
<b>Ĉeĥa Respubliko (inkl. Slovaka Respubliko)</b>	<b>160 KCS</b>
Peranto: Pavel Polnicky, Lesní 150/VI, 290 01 Poděbrady. Tel.: 0324 (61)5651.	
<b>Estonio</b> *)	
Peranto: Heli Tammik, Käbi tn 4-10, EE 90506 Haapsalu.	
<b>Finnlando</b>	<b>150 FIM</b>
<b>Familiaj membroj</b>	<b>25 FIM</b>
<b>20</b> Poŝta konto n-ro 800027-4306 454	

nome de Suomen Kristillinen Esperantoliitto. Kasistino: Soili Salminen, Kivikatu 8 C 51, SF-15700 Lahti. Tel.: 03-781 7637.	
<b>Francio</b>	<b>130 FRF</b>
CCP n-ro 10456 15 U Paris, nome de Franca Evangelia Esperanto-Ligo (FEEL). Kasisto: Philippe Cousson, 26 Rue de Pré Ventenet, FR-86340 Nouaillé-Maupertuis. Tel. 05 49 468021.	
<b>Germanio</b>	<b>38 DEM</b>
Poŝtĝirkonto n-ro 109204-206, BLZ 20010020 nome de Sonderkonto Esperanto. Kasistino: Astrid Hanke, Am Friedrichshain 37, DE-25980 Westerland/Sylt. Tel.: 04651 5510, fakso 04651 21963.	
<b>Hungario</b> *)	
Peranto: S-ino Irén Bagi, Baross u. 54/B.II.8, 1201 Budapest. Tel.: 01 283 6566.	
<b>Japanio</b>	<b>15 • (aerpoŝte + 3 •)</b>
Peranto: Seiziro Kawamura, Rex Kiyomizogoj 702, Shin miyagawa-cho dori gojo agaru 2 yamada-cho 501, Higashijama-ku-Kyoto 605.	
<b>Kazaĥstano</b> Vidu ĉe Rusio *)	
<b>Korea Respubliko</b>	<b>15 • (aerpoŝte + 3 •)</b>
Peranto: Puramo Chong, Kwangmyong-shi, Kwangmyong 2 dong 50-5, Kyongki-do, Koreio, 423-012.	
<b>Latvio</b> *)	
Peranto: Valdis Gulbis, Lielá iela 1 dz. 2, Valdemārpils Talsu raj, LV-3260.	
<b>Litovio</b> *)	
Peranto: Erikas Laiconas, P/k 165, LT-3000 Kaunas, Tel.: 370 7 222131.	
<b>Nederlando</b>	<b>43 NLG</b>
<b>Familiaj membroj</b>	<b>5 NLG</b>
Poŝtbankkonto n-ro 108 75 75 nome de KUNE. Kasistino: Gerda Dercks, Ootmarsumsestraat 47, 7607 AX Almelo. Tel.: 0546-819403.	
<b>Pollando</b>	<b>24 PLZ</b>
Peranto: Kazimierz Leja, poŝtfako 59, 41-250 Czeladz. Tel.: 032- 265 05 91.	
<b>Rumanio</b> *)	
Peranto: Maria László, CP 202, 4800 Baia Mare. Tel.: 062 426182.	
<b>Rusio (inkl. Belorusio, Kazaĥstano kaj Ukrainio)</b> *)	
Peranto: Larisa Kuzmenko, Kuŝvinskaja 25A,	

622013 N. Tagil, Sverdlovskaja Obl. Rusio.	
<b>Slovaka Respubliko</b> *)	
Vidu ĉe Ĉeĥa Respubliko.	
<b>Svedio</b>	<b>160 SEK</b>
<b>Familiaj membroj</b>	<b>20 SEK</b>
Poŝtĝirkonto n-ro 9 14 39-0 nome de Kristliga Esperantoforbundet. Kasisto: Arne Lundkvist, Kyrkogatan 28, SE-33131 Värnamo, Tel.: 0370-13908.	
<b>Svislando</b>	<b>15 •</b>
<b>Familiaj membroj</b>	<b>2 •</b>
Pagu al la svislanda UEA-konto (vidu aliloke)	
<b>Ukrainio</b> (Vidu ĉe Rusio) *)	
<b>Usono</b>	<b>15 • (aerpoŝte + 3 •)</b>
Peranto: Joel Amis, 16800 Phillips Road, Alpharetta GA 30201.	

\*) kotizo laŭ interkonsento kun la peranto.

## Adopta Kaso

KELI praktikas modelan sistemon helpi al finance malfortaj personoj membriĝi kaj ricevi nian revuon Dia Regno. Relative malmultaj membroj en ekonomie fortaj landoj donacas grandanime monon al la Adopta Kaso, por ke ni povu servi tiusece. Intertempe la iamaj „nepagipovaj landoj“ pli malpli progresis, sed kiu povas taksu tion? Ni volas resti ankoraŭ ĉe nia sistemo, sed petas la membrojn kaj la reprezentantojn en landoj, kiuj senkoste ricevas DR, pripensi laŭfortan kontribuon. En la kotizotabelo ni en tiaj landoj ne fiksas la kotizon, sed rimarkis jene: \*) kotizo laŭ interkonsento kun la peranto.

En 1999 donacis al la Adopta Kaso:

Britoj (el 48 membroj)	504 NLG
Nederlandanoj (el 40 membroj)	379 NLG
Germanoj (el 40 membroj)	275 NLG
Svisoj (el 10 membroj)	257 NLG
Finoj (el 17 membroj)	151 NLG
Svedoj (el 53 membroj)	145 NLG
Usonanoj (el 14 membroj)	119 NLG
Hispanoj (el 4 membroj)	36 NLG
diversuloj	48 NLG
SUME (1 EUR = 2,20 NLG)	1914 NLG

Kore dankas la donacintojn kaj jam antaŭdankas la donacontojn kaj kontribuontojn de la Adopta Kaso via kasisto Siegfried KRÜGER

## Listo de la aliĝintoj (31.01.2000) 50-a kongreso de KELI, Janské Lázně, Ĉeĥio

1. Polnicky Pavel, Ĉeĥio
2. Krüger Siegfried, Germanio
3. REHM Britta, Svedio
4. COUSSON Philippe, Francio
5. BURKHARDT Adolf, Germanio
6. BURKHARDT Grete, Germanio
7. VOKACOVA Danuse, Ĉeĥio
8. PELCOVA Bohuslava, Ĉeĥio
9. BIELOVIENE Nijole-Terese, Litovio
10. ŠUKIENĖ Irena, Litovio
11. MUNGER Marilu, Germanio
12. HUB Marianne, Germanio
13. HUB Horst, Germanio
14. HANDLOVA Jarmila, Ĉeĥio
15. CHRDLLOVA Stanislava, Ĉeĥio
16. CHRDL Petr, Ĉeĥio
17. BAGI Iren, Hungario
18. PEEK Günter, Germanio
19. PEEK Ingeborg, Germanio
20. VAN DIJK-KUPERUS Els, Nederlando
21. VAN DIJK Jaap, Nederlando

## LETERO PRI JET 2000

Kara Philippe, ĵus mi ricevis vian revuon *Dia Regno*. Mi ĝojis, ke jam enestas la informo pri JET' 2000 Taizé.

Enestas unu grava korektenda informo: JET' 2000 ne okazos je 13.-20.8.2000, sed unu semajnon pli frue: **6.-13.8.2000**.

Ni decidis ŝanĝi la semajnon, ĉar en la semajno 20.-27.8.2000 okazos la Junularaj Mondaj Tagoj (JMT) de la Papo en Romo (vi memoras la saman eventon je 1997 en Parizo).

Unue ni ne atentis la JMT-kunvenon. Poste ni pensis, ke nur tre malmultaj el niaj eblaj JET-anoj volas partopreni en JMT. Sed intertempe la italaj Esperantistoj komencis organizi Esperantan sektion en JMT'2000, kaj publikigis, ke oni atendas 2-3 milionojn da gejunuloj en JMT en Romo.

Ni nun decidis ŝanĝi nian JET'2000-tempon. Bv. publikigi en la venonta *Dia Regno* ĉi tiun ŝanĝon.

Kun koraj salutoj de

Bernhard EICHKORN  
Romäusring 20, D 78050 Villingen  
rete: Bernhard.Eichkorn@esperanto.de

# KIRCHENTAG: germana katolika tago de la Eklezio – Hamburgo 2000

De la 31a de majo ĝis la 4a de junio okazos en Hamburgo la 94-a Germana Katolika Foiro kun pli ol 50.000 partoprenantoj. Dum en antaŭaj jaroj en grandaj kristanaj aranĝoj oni evitis diskuti pri lingvaj problemoj, la invito al la Katolika Foiro en Hamburgo eksplicite mencias, ke oni celas i.a. trovi respondojn al la demando „*Kiamaniere la tutmonda interna komunikado en la eklezio povas sukcesi pli bone?*”

Sekve unuafoje en la historio de germanaj katolikaj foiroj la organizantoj akceptis prelegon kun diskuto pri la perspektivoj de Esperanto kiel eklezia lingvo. La fakto, ke tia programero – kiu estis origine proponita nur kiel kontribuo organize, enhave kaj finance prizorgata de la germana IKUE-sekcio – anstataŭe akceptiĝis en la centra programo de la Katolika Foiro, signifas ĝojigan rekonon de la katolika Esperanto-movado.

La prelego kun diskuto havos la titolon „*Esperanto – das neue Latein der Kirche? Die internationale Sprache im Dienst der Verständigung zwischen Christen aus al-*

*ler Welt*” („Esperanto – ĉu la nova latino de la eklezio? La internacia lingvo servanta al kompreniĝo inter kristanoj el la tuta mondo”) kaj okazos sub gvido de Ulrich MATTHIAS surbaze de lia preskaŭ samnoma germanlingva libro.

o O o

Aldonaj rimarkoj:

\* Pri la aliaj programeroj proponitaj de la germana IKUE-sekcio (informstando, Sankta Meso en Esperanto) ankoraŭ ne venis la definitivaj respondoj, sed certe ankau ili estos pozitivaj.

\* Se iu el vi ŝatus iel kunhelpi en la aranĝo, mem kontribui al ĝi aŭ havas proprajn ideojn pri ĝia enhavo, bv. kontakti min.

\* Germanaj aŭ eksterlandaj IKUE-anoj aŭ esperantistoj, kiuj ŝatus ĉeesti la Katolikan Foiro, povas anonci sin ĉe mi. Almenaŭ lige kun la informstando ni ricevus kelkajn senpagajn biletojn por tuttempa partopreno. Amike

Ulrich MATTHIAS  
listo IKUE

**Estraro de KELI:** (inter krampoj la fino de ĉies deĵorperiodo).  
Adolf BURKHARDT: prezidanto (2000);  
Philippe COUSSON: redaktoro kaj vicprezidanto (2000);  
Els VAN DIJK: sekretario (2001);  
Siegfried KRÜGER: kasisto (2002);  
**membroj:** Jacques TUINDER (2002),  
Éva FARKAS (2000); MA Youngtae (2001); Britta REHM (2001);  
Arne LUNDKVIST (2000),  
David FEATHERSTONE (2000);  
Pavel POLNICKY (2002).

## Wim VAN GANSWIJK

La 20-an de decembro 1999 mortis en la urbo Groningen nia membro Wim VAN GANSWIJK, la edzo de Wil. Dum monatoj li suferis pro grava malsano. Wil flegis lin hejme ĝis la fino. Wim naskiĝis je la 22-a de aŭgusto 1920 en la vilaĝo Putten en la centro de Nederlando. Ni kondolencas la filon kaj Wil. La Diservo kaj entombigo okazis la 23-an de decembro.

Els VAN DIJK

## Krucvortenigmo

1		2	3	4	5		6
	■	7				■	
8	9		■	10		11	
12		■	13		■	14	
15		16		■	17		
	■	18				■	
19							

## Kromsolvo

7	2	17	4	6	16	19
---	---	----	---	---	----	----

## Naŭdekjariĝo

La 24-an de marto 2000 nia konata KELI-ano H.A. DE HOOG esperas atingi la aĝon de 90 jaroj. Okaze de tiu festa tago, li salutas ĉiujn amikojn kaj konatojn.

Lia sanstato estas ankoraŭ kontentiga, cerbo kaj memoro funkcias centprocente, sed lia vidpovo malpliĝis ĝis 10% de la normala. Tio estas preskaŭ tragedio por homo kiu pasigis sian vivon inter libroj kaj per libroj. Lia adreso estas: S-ro H.A. DE HOOG, Sans Souci ap.102, NL-1902 CP Castricum, Nederlando.

Leen HORDIJK

## MAL-NEKROLOGO

En la protokolo de la jarkunveno de KELI, pro miskompreno, kelkaj personoj estis anoncitaj kiel mortintoj, sed ili bone vivas, dankon! Ili simple malaliĝis al la internacia movado, restante membroj nur de la sveda sekcio. Temas pri Bergitta EKVALL, Hans HAGG kaj Sven KLINTE-MO.

## Krucvortenigmo

**horizontale:** 1. prezidanto de kristana komunumo, 7. nutromanier', 8. malventa ŝipflanko, 10. daŭre restadi, 12. sufikso inklina, 13. cirklonombro, 14. en ia loko, 15. ĉirkaŭigas la talion, 17. river' de Florenco, 18. meritante, 19. religia muzikverko.

**vertikale:** 1. societo de kredantoj, 2. naskito, 3. refleksiva pronomo, 4. nia organizo, 5. scienca vorto signifanta orelon, 6. eosto, 9. inklino, 11. transpag', 13. konstruaj' super rivero, 16. plurala poseda pronomo, 17. spirebla gas'.

**kromsolvo:** eklezia oficisto.

Fritz LAUTENBACH

## Solvo de la krucvortenigmo 819a

**horizontale:** 1. episkopo, 7. diet', 8. leo, 10. loĝi, 12. em, 13. pi, 14. ie, 15. zono, 17. Arn', 18. inde, 19. oratorio.

**vertikale:** 1. eklezio, 2. ido, 3. si, 4. KELI, 5. oto, 6. oriento, 9. emo, 11. ĝir', 13. pont', 16. nia, 17. aer',

**kromsolvo:** diakono.

## Solvo de la krucvortenigmo 819b

**horizontale:** 1. reference, 8. eliri, 9. Dan', 11. tri, 13. Amos, 14. irus, 15. komponist', 17. neame, 18. oranĝerio.

**vertikale:** 1. redakcio, 2. fenomeno, 3. el, 4. rim', 5. er', 6. nitriter', 7. epistolo, 10. amo, 12. Rus', 14. in, 16. omaĝ'.

**kromsolvo:** Kantaro.

*fino el p. 24*

La kontribuajtoj venu al nia redakcio antaŭ la 30-a de aprilo 2000. Ni aljuĝos premiojn al la kontribuintoj. La premioj ricevos ĉinajn metiartaĵojn, Esperanto-librojn kaj unu-jaran abonon de *El Popola Ĉinio*. Ĉiu kontribuinto ricevos donaceton.

Ni publikigos elstarajn kontribuojn en la rubriko 50 jaroj — *El Popola Ĉinio*. La rezulto de la konkurso leĝeblos en la julia numero de *El Popola Ĉinio* 2000. Dum la 85-a UK en Tel Aviv de Israelo ni anoncos la rezulton kaj disdonos la premiojn.

La redakcio de *EL POPOLA ĈINIO*  
rete: [epc@china-report.com](mailto:epc@china-report.com)

Interredaktore **23**

En la Vogezaj praarbaroj de Germanio vivis en fora tempo multege da ermitoj. Unu el ili ĉiuj konis kiel tre sanktan viron. La ĉasistoj certigis esti vidintaj, kiel sovaĝaj bestoj, ursoj, aproj kaj sciuroj kolektiĝadis kaj modeste atendadis ĉe la enirejo de lia groto, dum la ermito kantis laŭdon al Dio. La enloĝantoj de la valo nokte ne plu estis surprizitaj, kiam ilin frapis fremda lumbrileto super la monto, kie la viro de Dio restadis. Jam ofte junaj homoj el tiu regiono estis petintaj permeson novice vivi kune kun li. Ĉu aliaj ermitoj ne havis kun si unu, du aŭ tri disĉiplojn, kiujn ili incisis en la preĝadon? Ĉiuj ricevis la saman respondon negativan. Escepte de unu.

La kialon de tiu privilegio oni aŭdis el lia buŝo mem post la morto de lia majstro.

„Je 18-jara aĝo mi anoncis min ĉe la ermito, petante restadi ĉe li. Je lia demando: «Kial?» mi respondis: «Ĉar mi deziras lerni preĝadon». Ĉi tiuj vortoj ekbruligis lumon de teneeco en la rigardo de la maljuna ermito. Tiam li demandis al mi: «Kaj kial, filo, vi deziras lerni preĝadon?» «Ĉar ĝi estas la plej granda scienco». «Mi dezirus vin akcepti, sed mi ne povas» — li respondis, ne sen ĉagreno.

Tri jarojn poste mi revenis por viziti lin. Li akceptis min kiel vera patro akceptas filon kaj starigis la saman demandon: «Kial vi deziras lerni preĝadon?» «Por fariĝi sanktulo». Mi estis konvinkita pri tio, ke ĉifoje li min akceptos. Ĉu mi ne elparolis la plej noblan motivon? Sed denove li respondis rifuze; mi sekve forlasis lin perdinte ĉiun esperon.

Mi reprenis la laboron sur la kampo. Sed pli ol iam, de la mateno ĝis la vespero, min persekutis la arda deziro ĉirkaŭbraki vivon de preĝado. Okazis ke mi ploris, pensante pri tiu, kiu sur la alta monto konfiden-

ce vivadis kun sia Dio.

Alproksimiĝis la festo de Kristnasko. Subite mi ekstaris. Mi sentis min tute certa ke ĉifoje li min akceptos. Kiam mi alvenis, li estis profunde droninta en preĝoj kaj konsekvence ne atentis min. Mi atendadis longan tempon; mia senpacienco kvietiĝis. Kiam li rigardis malantaŭen, li tute ne ŝajnis mirigita pri mia ĉeesto. Mi prenis la parolon ne lasante al li la tempon por starigi demandon: «Mi deziras lerni preĝadon, ĉar mi volas trovi Dion».

Tiam li patre etendis siajn brakojn kaj akceptis min kiel sian disĉiplon”.

Prilaboris: Jacques TUINDER

## Kontribuo petata por „50 jaroj por Esperanto, Paco, Ĉinio”

En majo de la jaro 2000, la redakcio de *El Popola Ĉinio* festos sian 50-jaran jubileon. En duonjarcento la revuo *El Popola Ĉinio*, la Esperanto-movado en Ĉinio kaj la tuta mondo spertis grandajn ŝanĝiĝojn. Vi, spertanto de la 50 jaroj, certe havas ion por verki, por diri al la aliaj. Pro tio ni lanĉos konkurson 50 jaroj por *El Popola Ĉinio* kaj sincere petas viajn kontribuajojn.

Vi povas verki kun tre ampleksa temo, rilate al *El Popola Ĉinio* — **Esperanto, Paco kaj Ĉinio**. Ekz. Viaj esperantista sperto, opinio pri Esperanto-movado kaj paco, amikaj kontaktoj kun alilandanoj, impresoj pri kaj rilato kun Ĉinio kaj la revuo *El Popola Ĉinio*...

Viaj kontribuajoj povas esti en ajnaj stilo kaj formo. Estas tre bonvenaj koncernaj fotoj kaj portreto de la aŭtoro por ilustrati la artikolon.

*fino sur p. 23*